

ESPERANTO

REVUO INTERNACIA



*La monumento de Mickiewicz, aŭtoro i.a. de
"Sinjoro Tadeo", en Varsovio.*

N-ro 644-5 (7-8)

Jul/aŭg. 1959



Lamenhof-Jaro

**Universala
Esperanto-Asocio**

**(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)**

esperanto

JUL/AŬG. 1959

5 2 a J A R O

REVUO INTERNACIA N-RO 644-5 (7-8)

Fondinto : H. HODLER

Honora Redaktoro : HANS JAKOB

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktorino :
S-ino Kirsten Zacho, Randsbølvej 4, København, Danlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto
(abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-C.,
Nederlando. Telefono : Rotterdam 128313. Ĝirkonto : 378964

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive
la redakcion aŭ la Centran Officejon (vidu supre) antaŭ
la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon
al nia redakcio.

Jara abono (1959) : 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro
12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld $\frac{1}{2}$ paĝo 64,— gld $\frac{1}{4}$ paĝo 32,— gld
 $\frac{1}{8}$ paĝo 16,— gld $\frac{1}{16}$ paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37,
Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere
Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road,
London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban,
Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Ing. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj,
viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj,
Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo,
Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro, Palais Wilson Genève. Svislando.

Honora Administranto : Hans Jakob. Telef. 32.30.34.

Enhavo

Tri Libroj	121
La Stato de la Kampanjo de la Membraro	121
La uzado de Internacia Lingvo sur la Scienca Kampo, Prof. D-ro G. Canuto	122
Kiel Noktpapilio al Lampo, Marjorie Boulton	125
Korekto	127
Gratulojn al Jan kaj Julja Isbrucker . .	128
Prof. D-ro Edmond Privat sepdekjara .	129
Bravo, Hago !	130
La Informado pri la Internacia Lingvo en la Jaro 1958	131
Tabela Trarigardo pri la Informa Laboro en 1958	132
Kiu estas Kiu en la Esperanto-Movado	134
Regularo pri la Oratora Konkurso . . .	137

Rubrikoj :

Okaze de la Zamenhof-Jaro	127
CED	130
Radio-Babiloj	135
La Internaciaj Konkursoj 1959	135
Esperantista Vivo & Nekrologo . . .	135
Tra la Mondo	136
La Poŝtmarkkolekto	136
Radio	137
Novaj Libroj	138
Oficiala Informilo	139

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la
redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare
tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur
unu flanko de la papero (prefere en normformato
A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno
maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto.
Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn super-
signojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn
manuskriptojn oni resendadas nur kontraŭ afranko
aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

TRI LIBROJ*

reprezentantaj la tri ĉefajn tendencojn de la Movado

En la lasta jaro aperis tri libroj de eksterordinara signifo, kiuj respondas al tri paralelaj linioj en la Esperanto-movado. Necesas ĵeti apartan lumon al ili:

Pli ol dudek jarojn post la dua eldono, aperis la unua volumo de la tria eldono de *Plena Gramatiko de Esperanto* de K. Kalocsay kaj G. Waringhien. La verko donas detalan, science profundan analizon de la interna strukturo de la hodiaŭa Internacia Lingvo. Post la unua dekseks-regula gramatiketo, kiu estas kaj restas la bazo de la lingvo, ĝi ordigas, klasigas, sistemigas la kreskintan lingvan materialon estiĝintan per abunda literatura uzado. Forte vivante, majstre manipulate de grandaj verkistoj, la lingvo daŭre evoluis kaj ricevis siajn idiomaĵojn. Aliflanke, la verkintoj forte defendas la fundamentajn Zamenhofajn principojn kaj apelacias al ĉiuj seriozaj lingvouzantoj sekvi la Zamenhofan lingvon precipe en la esencaj punktoj.

La *Plena Gramatiko* estas bezonata gvidlibro por ĉiu konscia praktikanto de la lingvo. Ĝi grave kontribuas al la unuecigo kaj perfektigo de la lingvo kaj stilo. En tiu rilato la verko estas esprimo de strebado al altigo de la lingva nivelo kaj fortikigo de la lingva unueco, tendenco manifestiĝanta nuntempe i.a. ankaŭ en la aranĝado de literaturaj kaj oratoraj konkursoj.

Tiu juna, unueca, ĉiam perfektiganta lingvo ja apartenas al internacia homunuco, kiu estas ĝia socia portanto: la tutmonda esperantistaro. Per ĝi esprimiĝas nova tuthoma kulturo, kreita kaj daŭre kreata de tiu homgrupo. De ĝia literaturo en la plej pura formo, la poezio, la *Esperanta Antologio* redaktita de W. Auld montras la altajn valorojn per reprezenta kolekto.

Ĉiu regiona, nacia kaj ankaŭ internacia homa unuo havas sian komunan minimuman kulturbazon. Tiu de la tutmonda esperantistaro nun kuŝas fiksita, konkretigita en la *Esperanta Antologio*. Ĝi atestas pri la kultura heredaĵo de la esperantistoj kaj donas grandajn promesojn pri ĉiam pli altaj artesprimoj. Ĝia apero signas tiun alian tendencon en la nuna movado: rekoni kaj emfazi la altajn kulturajn valorojn kreitajn per la lingvo.

Satadon de poezio la pli multaj homoj devas lerni. Kiu ne komprenas, eĉ neniam legas poezion en propra lingvo, ne riproĉu la verkinton, se samnivelan poezion en Esperanto li ne povas tuj digesti. La tutmonda literaturo evoluas tute analoge al la evoluprocezo de la nacilingvaj literaturoj. Valoras ĝin studi!

La tria tendenco en la hodiaŭa movado montriĝas en la klopodoj forte antaŭenigi Esperanton en la ĝenerala kultura mondo, doni en taŭga formo vastan informadon pri tiu belega lingva instrumento kaj kreilo de internacia kulturo. Por tio necesas raciaj sciencaj argumentoj apud varma entuziasmo kaj firma ideologio. Ĉion ĉi abunde donas precipe en sia unua parto la verko *Retoriko* de I. Lapenna. Ĝi klare montras la pozicion de Esperanto inter la lingvoj, indikas kiel konvinki per trafaj argumentoj pri justa kaj ĝusta afero. Per fera logiko la ĉapitroj pri ekesto de la lingvo ĝenerale, influantaj faktoroj, formiĝo de grandaj kulturlingvoj, kondukas al tiuj pri ekesto, formiĝo, evoluo kaj kultura signifo de la Internacia Lingvo. Ĉiu esperantisto, kiu deziras objektivite argumentadi pri Esperanto devas ne nur legi, sed ankaŭ forte enkapigi kaj spirite digesti tiujn ĉapitrojn. Ilia enhavo povas esti la bazo de ĉiu serioza diskutado pri la Internacia Lingvo.

Resume, antaŭ ni, je dispono de ĉiu progresinta, studema kaj batalanta amanto de Esperanto, kuŝas tri modelaj verkoj, kiuj troviĝu sur la tablo — eĉ ne en la ŝranko — de ĉiu esperantisto kaj kiuj en ĉiu okazo estu la bazaj studlibroj en ĉiuj superaj kursoj. M. H. Vermaas

*) Por detaloj vidu lastan kovrilan paĝon de tiu ĉi numero.

LA STATO DE LA KAMPANJO DE LA MEMBRARO

Pardonu ke ankoraŭ foje mi alvokas vin, karaj gelegantoj.

Mia pozicio en la Movado estas de la Financoj sen salajro kaj iom delikata. Funkcii kiel Ministro precipe sen mono, estas vere malfacila afero.

Mi ricevas de ĉiuj partoj de la mondo leterojn, kaj en tiuj leteroj estas tre bonaj konsiloj: "Vi devus fari tion, organizi grandan aferon, eldoni tion... k.t.p.... sed miaj karaj korespondantoj forgesas diri kiu faros tion, kaj per kiu mono.

Ĉar oni finfine devas scii en la movado ke nia administretejo funkcias kun malmultaj oficistoj. Vi sciu la kialon: "ĉar ni ne havas sufiĉe da mono por havi pli multajn.

Kaj vere, ĉio funkcias bone, dank'al dio, sed precipe, dank'al grava sindono de niaj oficistoj kiuj deĵoras pli ol 40 horojn ĉiusemajne!

Do, la plej grava problemo estas rikolti monon!

Mi bone konas la aferon de la almozpetano kiun ni faras dum la tuta jaro, ĉar mi estas Prezidanto de loka grupo (Perpignan) Prezidanto de regiona federacio (Languedoc-Roussillon) kaj Prezidanto de la Landa Asocio (Francujo).

Malgraŭ niaj lokaj, regionaj, landaj bezonoj, ni devas kompreni ke nenio estas farebla sur la tutmonda grundo, sen Universala Asocio.

Do, prezidantoj, kasistoj, profesoroj, instruantoj, ekkonscii pri la valoro de nia kara lingvo. Ĝi ne estas senvalora varo, sed vera trezoro, kaj, por akiri ĝin, estas normale pagi.

Nia lingvo ne estas bagatelaĵo, sed donas al la homoj kiuj posedas ĝin, altan valoron.

La plej bona ago por ke la stato de la kampanjo de la Membraro pliboniĝu, estus ke ĉiuj lernantoj de lokaj kursoj kaj membroj de grupoj fariĝu aŭtomate Membroj de UEA, kaj la lokaj komitatanoj almenaŭ M.A. René Llech-Walter

La Uzado de Internacia Lingvo sur la Scienca Kampo

Parolado de Prof. D-ro Giorgio Canuto farita en Rotterdam, la 6-an de Aprilo 1959-a

Satataj geaŭskultantoj!

Se vi eniras la korton de la Torina Universitato, vi povas vidi memortabulon, sur kiu oni legas ke via samurbano Erasmo, la mondkonata Erasmo el Roterdamo, en la jaro 1506, en la Universitato de Torino doktoriĝis pri Teologio.

Tio povis okazi ĉar en tiu tempo ĉiuj Universitatoj uzis la saman kaj nuran lingvon, la latinan, kaj tiam la nederlandano Erasmo, kaj la profesoroj, el kiuj ajn landoj ili estus, povis interkompreniĝi kiel samlandanoj.

Tiu uzado de la latina lingvo inter la kleruloj de la mezepoko estas al ĉiu konata, kaj ofte oni citas ĝin kiel enviindan staton. Sed ne ĉiuj scias kiel tia ĝenerala uzado de la latina lingvo malaperis, por lasi sian lokon al la naciaj lingvoj.

Ŝajnas ke la unua kiu interrompis la tradicion estis *Bombast von Hohenheim*, kromnomita *Paracelsus*, kiu komencis en siaj lecionoj uzi la germanan lingvon. Certe unu el la unuaj, kiuj skribe uzis nacian lingvon, estis la tre fama italo *Galileo Galilei*, certe ne pro nescio, ĉar li skribis en 1510 ankoraŭ en la latina lingvo, sed ĉar li estis vere konvinkita, ke la malnova lingvo ne plu taŭgis por la modernaj ideoj.

La latina lingvo vivis dum la mezepoko, tute specialan ne naturan vivon, kiel ilo de tiu kulturtrezoro literatura filozofia, religia, kiu disvastiĝis tra la tuta Eŭropo post la falo de la Romia Imperio, kvankam ĝi ne plu estis vivanta lingvo ligita al ĉiutaga uzado de popolo. Sed kiam la homaro havis ion novan por diri, por aldoni al tiu antaŭa kulturtrezoro, jen ke la malnova lingvo plu ne sufiĉis. Kaj tio fakte komencis precize en la plej novaj kampoj de la kulturo, la sciencaj branĉoj de la matematiko kaj de la fiziko.

Kaj tio restas unu el la plej gravaj motivoj pro kiuj tute absurda estas la ideo, de tempo al tempo reproponita, ke la latina lingvo povus ankoraŭ esti uzata en la scienca kampo kiel internacia lingvo.

Cetere oni povas pridubi ke la latina lingvo havis rolon de internacia lingvo ĝenerala, tutmonda, kian oni nun bezonus kaj kian nun oni atendas.

Sufiĉas pensi, ke kiam Erasmo doktoriĝis en Torino, Ameriko ankoraŭ ne estis Ameriko, sed nova kontinento malkovrita nur de post 14 jaroj, tute nekonata estis la plej granda parto de Afriko kaj en la Mediteraneo mem, dum longa tempo regis la influo de la greka lingvo kaj de la araba, precipe en la plej modernaj kampoj de kemio kaj medicino. Kaj kion diri pri la malproksima oriento, pri la granda influkampo de la miljara kulturo Ĉina?

Se ni do bone objektive konsideras la aferon, ni vidas fakte, ke ĝis nun *neniam en la mondo ekzistis vera komuna lingvo por ĉiuj kleruloj*.

La latina lingvo estis la kultura lingvo, dum kelke da tempo, de la limigita teritorio, kie disvastiĝis la kristana religio.

Kio okazis post la forlaso de la uzado de la latina lingvo en la tempoj al ni pli proksimaj, estas ĝenerale konate.

Dum komence ludis grandan rolon la franca lingvo, poste en multaj kampoj superregis la germana, kaj nun en la lastaj tempoj ŝajnas pligrandiĝi la graveco de la angla, precipe pro la influo de Ameriko.

Tiel proksimume antaŭ 50 jaroj, antaŭ la unua granda milito, mia patro povis diri al mi: "Kara filo, se vi volas havi en la manoj la necesajn ilojn, por vin dediĉi al superaj studoj, vi devas eniri en la Universitaton scipovante tralegi, rapide kaj flue, tekstojn en franca kaj germana kaj angla lingvoj". Se oni aldonas ke ni italoj senpene povas kompreni tekstojn en hispana kaj portugala lingvoj, vi vidas kiel la konsilita studado donis fakte al mi bonan ilaron, por povi rekte preni la informojn necesajn en la ĉefaj revuoj kaj lernolibroj de la mondo, kio estas unu el la unuaj necesoj de la lingva uzado en la scienca kampo.

Tamen ankaŭ per tiu sufiĉe vasta kono, (kiun mi nuntempe malofte konstatas inter la junuloj studentaj en Universitato, eble pro la amaso de konoj, kiujn ili devas studi por la aliaj fakoj, kiuj intertempe multe kreskis) restis ĉiam granda kvanto da verkoj tute ne exploreblaj: en la nord-eŭropaj lingvoj, en la slavaj, inter kiuj nun estas precipe grava la rusa, kaj ankaŭ en la aliaj orientaj lingvoj de la turka ĝis la japana.

La situacio do fariĝis ĉiam pli kaosa kaj malfacila. Krome en la scienca aplikado de lingvoj ne estas nur necese scii legi la tekstojn, kiuj utilas por la informado, sed de tago al tago, ĉiam pli oni bezonas lingvojn por la rekta persona kontakto inter la sciencistoj, ĉar ili tute simple kunvenas en kongresoj por kune diskuti la problemojn, ĉar ili vojaĝas de unu lando al la alia por prelegi pri siaj eltrovoj aŭ por lerni en fremdaj Universitatoj.

Kaj ni povas konstati ĉe ni mem, kaj ĉe ĉiuj niaj kolegoj, ke tute alia afero estas scipovi lingvon laŭ lego-kapableco, aŭ scipovi lingvon por ĝin paroli, por fari per ĝi paroladon pri iu teknika temo kaj ne nur pri la simplaj bagatelaĵoj de la komuna vivo.

De tio venas la malfacilaĵoj, kiujn oni renkontas en ĉiuj internaciaj kongresoj kiam oni devas antaŭe

pridiskuti, pri la uzotaj lingvoj. Mi scias pri kongresoj kiuj devis esti prokrastitaj pro la manko de tiu fundamenta interkonsento.

Kaj poste, dum la kunveno mem venas la turturi, kiel stulta estas la duobla kaj triobla eldonaĵo de ĉiuj publikaĵoj de la kongreso, kun evidenta malŝparo en la kostoj de la presado.

Kaj poste, kiam la lingvoj estas elektitaj (du, mento de la temporaba tradukado, ofte malbona.

Mi memoras kongreson pri infanpsikologio, en Milano, en kiu dum la unua tago oni tradukis ĉion en la tri lingvojn oficialajn: italan, francan, anglan.

La duan tagon oni diris: por ŝparo de tempo, ni faros nur la tradukadon en francan kaj italan, ĉar oni konstatis ke la ĉeestantaj angloparolantoj pli malpli komprenas ankaŭ la francan.

La trian tagon tamen, ĉiam pli mankis la tempo, kaj oni decidis ne plu fari tradukadojn. Oni anoncis, ke ili estas sendotaj hejmen al la kongresanoj. Ĉu ili ne estus povintaj tuj resti hejme kaj ŝpari la vojaĝelspezojn?

Ne pli bonan rezulton donas la tiel dirita *samtempa tradukado*, pere de la telefonaparatoj kaj de la tradukistoj kaŝitaj en kabinoj. Ili ĝenerale postulas havi antaŭe la tekston tradukotan.

Sed la vera viva intereso por la sciencaj kongresoj konsistas en la rekta diskutado farita el kritikoj, el petoj de klarigoj, el taŭgaj respondoj, kiuj certe ne povas esti antaŭe skribitaj por la tradukistoj.

Kaj tiam la samtempa tradukado fariĝas ofte tre ridinda afero pro la eraroj.

Mi memoras kongreson, en kiu la franca parolanto diris ke li metis por eksperimento ian substanceton en "*pots de terre*" (tio estas en argilajn vazojn). Sed la tradukisto komprenis "pommes de terre", kaj kompreneble, tradukis *terpomoj*, tiel ke la aŭskultantoj plu nenion komprenis de la priskribita eksperimento.

Ne restas do alia solvo, krom la samtempa uzado flanke de ĉiuj de la sama lingvo, tiel ke ĉiu povu per si mem rekte kompreni la oratoron, kaj rekte sin komprenigi. Sed kiun lingvon elekti?

Ĝis nun tian interkonsenton oni ne atingis, sed eĉ se oni morgaŭ ĝin atingos, rilate al unu lingvo, ekzemple la angla, restos ĉiam granda malfacilaĵo.

Kiom da homoj studas jam nun en la lernejo tiun lingvon dum diversaj jaroj? Kaj kiom da ili ĝin sukcesas posedi tiel bone, kiel sian gepatran lingvon?

Malfacile estas atingi plenan kapablecon en la parolado de fremda lingvo, alie oni ne taksus kiel tre malfacilan profesion, tiun de la interpretisto.

Je la foriro por vojaĝi ĉi tien mi aĉetis vesperan gazeton: en ĝi estas prezentita kiel granda malofaĵo, kaj kun la portreto, juna sinjorino kiu ĵus venkis konkurson kiel interpretistino ĉe ONU, pri angla, itala, germana lingvoj. Kaj ŝi estas denaske germana, edziniĝis kun italo kaj vivis kelkjarojn en Usono.

Kaj prezentante ŝin kiel malofaĵojn, oni aldonas, ke tre malfacila estas la kariero de la interpretistoj, kaj ke ili atingas pagojn, kiuj povas esti je pli ol 25.000 liroj potage, tio estas pli ol 150 guldenoj.

Ĉu ni do pretendu, ke la sciencistoj, krom la tempo por studi sian fakajn materiojn, superu ankaŭ tiujn malfacilaĵojn? Certe ne. Kaj ni havus en la mondo du kategoriojn da sciencistoj: tiujn kiuj libere povas paroli en la kongresoj kaj tiujn, kiuj nur pli malpli povus balbuti ion, kaj ion kompreni.

Do la solvo ne povas esti nur la elekto de unu komuna lingvo, sed devas esti ankaŭ, ke tiu lingvo estu facile plene lernebla, por ĉiuj, sen granda perdo da tempo.

Tiu lingvo, facile lernebla de la homoj de ĉiuj popoloj, kaj facile akirebla, ne nur surface, sed funde, kiel la propra lingvo, ekzistas: *ĝi estas Esperanto*.

Mi ne havas nun tempon por montri al vi, kial Esperanto estas facila, pro sia logikeco, pro sia simpla strukturo, pro la genia sistemo de la deveno de la vortoj el malmultaj radikoj, k.t.p.

Estas tamen nun tuta aro da konkretaj spertoj faritaj dum pli ol 70 jaroj da ekzistado de la lingvo, kaj tiuj asertoj ne estas fantaziaĵoj, sed estas faktoj, kiujn oni povas konstati ĉe ĉiuj niaj kursoj, kiuj okazas en la tuta mondo, ĉe la plej diversaj popoloj.

Jam antaŭ la milito la fama Pedagogia Instituto *Jean Jacques Rousseau* en Genevo, per precizaj psikoteknikaj esploroj, faritaj kun lernantoj de pli ol 80 kursoj okazantaj en diversaj landoj, povis konstati, ke la facileco de la lernado de Esperanto estas preskaŭ egala por ĉiuj popoloj, kaj ke la rezultoj, kiujn oni atingas en komparo kun la lernado de aliaj lingvoj, estas meze ses fojojn pli grandaj.

Foje estis en Torino iu japana profesoro de fiziologio de la Universitato de Tiba, prof. Suzuki, kiu intervjuita de la ĵurnalistoj deklaris: mi studis dum jaroj kun granda klopodo la anglan kaj la germanan lingvojn, kaj tamen uzante tiujn lingvojn, mi sentas min ĉiam neegala al la denaske parolantoj. Anstataŭ mi studis Esperanton preskaŭ ludante, nur kelkajn monatojn, kaj mi ĝin uzas kun la sama libereco, per kiu mi min esprimas en mia propra lingvo.

Similan sperton faris cetere mi mem, faris ĉiuj kiuj lernis Esperanton kaj aliajn lingvojn. Do kial ne uzi tiun facilan lingvon ankaŭ en la scienco?

Jam de la komenco la aŭtoro mem, D-ro Zamenhof, donis ekzemplojn de tradukado de sciencaj studoj, precipe medicinaj.

Tuj de la komenco sciencistoj estis allogitaj de la simpleco de Esperanto kaj fariĝis ĝiaj pioniroj.

Klerfamaj sciencistoj kiel Naville, Sébert, Bourlet, Bertelot, membroj de la Scienca Franca Akademio, la fiziologo Richet, Nobelpremiito, Bujwid fama kunlaboranto de la plej fama Pasteur,

kaj multaj aliaj scienculoj, profesoroj kaj Rektoroj de Universitatoj estis kaj estas Esperantistoj.

Jam de la komenco de la disvastiĝo de Esperanto fondiĝis la *Tutmonda Kuracista Asocio*, kaj la *Internacia Scienca Asocio*, kiuj eldonis fakajn revuojn. Ili estis la *lulilo* de la lingvo por sciencaj celoj.

Ĉar oni devas tamen pripensi, ke multe pli simpla kaj facila estas la uzado de la lingvo por la komunaj celoj kaj ankaŭ por la literaturaj, ol por la sciencaj, por kiuj oni bezonas aron da tute specialaj kaj precizaj teknikaj vortoj.

Kaj fakte la granda problemo, kiu nun estas bone solvita, estis tiu de la *teknikaj vortaroj*.

Sed ankaŭ tiuflanke Esperanto estas hodiaŭ perfekte preta por la enkonduko en la praktikan uzadon.

Jam aperis pli ol 110 fakterminaroj pri 44 diversaj sciencaj kaj teknikaj branĉoj. Inter ili menciindaj speciale estas la fakterminaroj pri *Anatomio* = *Arkitekturo* = *Aviado* = *Botaniko* = *Kemio* = *Elektrotekniko* = *Edukado* = *Juro* = *Medicino Ĝenerala* = *Muziko* = *Matematiko* = *Farmacio* = *Navigacio* = *Filozofio* = *Fiziko* = *Radio* = *Psikologio* = *Zoologio* = *Statistiko* = *Maŝintekniko* = *Fervojoj* = *Scienco Ĝenerale*.

Nun estas preparitaj novaj fakvortaroj pri *Radiotekniko* kaj *Aeronaŭtiko*. La Japana Esperanto Instituto kompilis ĝeneralan scienca terminaron kun la lastaj plej modernaj terminoj, kiuj intertempe aperis.

Tiuj vortaroj ne estas nur ellaborado teoria de specialaj komisionoj zorgantaj la kreadon de la necesaj novaj vortoj, sed kiel por la cetero de la lingvo Esperanto, la akiro de novaj vortoj okazis tute spontane, pere de daŭra verkado.

Ĉar ne nur ekzistas specialaj teknikaj Esperanto Revuoj, inter kiuj tre menciindaj la *Scienca Revuo* kaj la *Medicina Revuo*, sed estis ankaŭ eldonitaj libroj sciencaj en Esperanto, en la kampo de *Medicino*, de *Antropologio*, de *Botaniko* kaj de *Radiotekniko*.

Inter ili estas speciale menciindaj, la libro de *Ajsberg*, *Fine mi komprenis la radion*, kiu, eldonita unue en Esperanto, estis tradukita poste en 16 lingvojn, kaj la libro de la dano *Paŭlo Neergaard*, *Pri la vivo de la plantoj*, vere tiel interesa, ke nun ĝi estas tradukata en plurajn aliajn lingvojn. Se la homoj ne estus tiel plenaj de antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto, se en la tuta mondo la homoj dediĉus nur unuĵaran studadon al tiu lingvo, jen ke tiuj verkoj estus tuj kompreneblaj en la tuta mondo sen bezono de tradukoj.

Alia grava fonto de la scienca lingvo Esperanta estas la Esperantaj resumoj kiuj ĉiam pli multnombraj aperas en diversaj sciencaj naciaj revuoj, precipe en la revuoj medicinaj.

Ni citis plurfoje la laboron de la japanaj sciencistoj. Vere ni devas diri, ke tiurilate ili estas pioniroj. Ili estas tiuj, kiuj plejnombro publikigis tutajn sciencajn artikolojn en Esperanto, eldonis

fakajn Esperantajn bultenojn k.t.p. Inter ili ni povas memori la Bultenon de la Medicina Instituto de Nagasaki, de mia kolego jurmedicinisto *Asime Azada*, kaj la Bultenon de la *Astronomia Instituto de la Insulo Tatenō*.

La longaj militoj, al kiuj devis partopreni la japanoj, certe interrompis tiun grandan aktivecon sed jam post la milito pli ol 85 famaj sciencistoj japanaj, inter kiuj 68 universitataj profesoroj, subskribis la promeson ĉiujare eldoni almenaŭ unu disertacion en Esperanto, kaj aldoni Esperantajn resumojn al aliaj siaj verkoj.

Sed la granda avantaĝo, kiun Esperanto devas alporti en la scienca kampon, estas la rekta buŝa uzado de la lingvo.

Por konvinkiĝi pri ĝia speciala taŭgeco en tiu kampo estas sufiĉe partopreni dum Universala Kongreso de Esperanto al la tiel nomata *Somera Universitato*. En ĝi vere oni vidas revivi la miraklon de la tiel diritaj "*clerici vagantes*" de la mezepoko, nome de la tiamaj studentoj de Universitatoj, kiuj sen zorgoj pri la diverseco de la naciaj lingvoj, iris viziti la kursojn de unu Universitato al alia.

Kaj jen dum la Somera Universitato, Profesoroj de la plej diversaj nacioj, francoj, germanoj, italoj, angloj, danoj, jugoslavo k.t.p., povas prezenti siajn lecionojn al aŭskultantoj apartenantaj al 25-30 diversaj nacioj, kaj ili povas ĉiuj flue paroli pri siaj temoj, kaj esti rekte komprenataj sen helpo (aŭ ni diru sen malhelpo!) de tradukistoj.

Ĉu renoviĝo de la Pentekosta miraklo?

Ne, sed simpla bonvolo flanke de homoj, kiuj dediĉis 40-60 horojn de sia vivo, por la studado de tiu simpla, logika, facila lingvo, kiu estas Esperanto, kaj kiuj kuraĝis rompi la rutinon, per kiu ordinare oni daŭre preferas barakti inter la malfacilaĵoj de la plurlingveco, pro kiu en la sciencaj kongresoj la realaj aŭskultantoj de la paroladoj estas ĉiam malmultaj, pro kiu grandparto de la verkoj de la sciencistoj restas preskaŭ nekonataj al la plejmulto de la aliaj.

Do la ilo, kiu reprezentas la solvon de la problemo estas preta. Aro da sciencistoj jam ĝin uzas kun profito. Ili certe scios, iom post iom, altiri la atenton de la aliaj kaj ilin konvinki. Pri tio mi estas certa.

La germana filozofa Nietzsche, jam en la jaro 1866-a, en sia verko skribis, ke certe venos la tempo en kiu la homaro havos unu komunan lingvon, kiel certe venos la tempo en kiu la homo vojaĝos tra la aero.

Ni jam vidas la duan parton de la antaŭvido de la filozofa. Mi estas certa, ke ankaŭ la unua efektiviĝos, kaj ke ĝi ne estos per malfacila nacia lingvo, sed per la simpla, bela, klara, fleksebla Esperanto.

Kaj en la estontaj jarcentoj, kiam la uzado de Internacia Lingvo estos ordinara ĉiutaga afero, oni certe estos mirigita, pripensante kiom da kontraŭstaroj, kiom da antaŭjuĝoj oni devis venki por atingi tiun simplan kaj logikan rezulton.

Kiel noktpapilio al lampo

Longedaŭra nervostreĉo pri vizaj aferoj.....
Vojaĝo, kiu jam daŭris du noktojn kaj unu tagon..... Kapdoloro..... Etaj tremoj.....

Kial, en la granda stacidomo de Vieno, malforta, tre timema, trosentema poetino serĉis la vagonaron, kiu baldaŭ ekiros al Budapeŝto? Multaj geamikoj volis fortimigi ŝin: "Vi eble ne revenos!" "Danĝera lando, sovaĝa popolo, ruĝa registaro!" Tia vojaĝo multekostas, kaj riĉa ŝi ne estas. Ripozon ŝi bezonas, ne prelegvojaĝon..... tiu malforta virino, tiel ekscitigema, tiel nervoza.....

Ĉar, kiam la Hungara Esperantista Konsilantaro faris al mi la honoron inviti min al hungara prelegvojaĝo, mi komprenis, ke eĉ se estos danĝere, mi devos iri, kiel noktpapilio al lampo; ĉar post Bjalistoko kaj Varsovio, Budapeŝto estas por mi la plej pilgriminda urbo en Esperantujo. Du lampoj brulis tie tiel longe: Kolomano Kalocsay, ankoraŭ nia plej granda poeto, kun la plej altaj artaj kriterioj, kun la plej heleneca sindediĉo al la Belo; Julio Baghy, ankoraŭ nia plej sange viva romanisto, poeto ege simpatia, nun nove konata kiel genia dramverkisto..... kaj ĉu ne ankaŭ inter la plej amindaj, amataj homoj en la tuta Movado? Perdi tian okazon estus krimi kontraŭ mia propra spirito.

Kiel tremanta noktpapilio... kaj, fakte, tra la nokto (tria nokto en vagonaro), ĉar ni transiris la hungaran landlimon je proksimume la dua matene..... Ĝentile kaj sen drameco oni enlasis min. Kaj je la sesa matene, je la 28-a de marto, multjaraj revoj komencis plenumiĝi. Sur tiu perono en Budapeŝto salutis min Lajos Márton, sekretario de HEK, tre afable, tre servoprete; Albert Reiber, lerta proz-tradukisto, amiko mia, tre amike; kaj unu verda lampo preskaŭ cindrigis tuj la noktpapilion: tiuj longaj, ostecaj brakoj de Julio Baghy premegis min al la poeta koro. Kia ekflagro!

Nu, mi neniam estis en danĝero en Hungarujo... verŝajne en malpli da danĝero ol kiam mi transiris la ŝoseon en Londono. Pli ol mi revenis, ol aliris: eble tri-kvar kilogramoj; tia estas hungara gastamo! Kaj mia dioniza temperamento neniam pli konkrete adoris Dionizon, dion de inspirfrenezono... kaj de vino.

Unue, al Balatonelle, por ripozi kaj fari unu prelegon. La Fervojista Sindikato gastigis min tie. Belega, serena estas tiu Balaton-Lago. Ĉarmaj estis miaj gekamaradoj tie, kaj kortuŝe helpemaj kiam mi iom malsanis. Kara Baghy parolis kun mi dum ravaj horoj inspiroplenaj. Kiel profunde tiu homo amas sian patrujon, amas la tuthoman familion, malamas militon kaj ekspluatadon! kiel heroe li dediĉis sin al Esperanto, paco, kulturo, sia unika arto! Kaj tamen, heroe li ne pozas: li preferas moki sin: "Szeged estas bela urbo, sed

multe afliktita per naturkatastrofoj..... Tie mi naskiĝis". "Jes, en Hungarujo ni havas multajn interesajn historiajn ruinojn... min, ekzemple". "Tiu ĉi nazo mia? Hej, kiam oni disdonis nazojn mi impulse kaptis mian porcion ne per unu mano, sed per du..." Li ne estas mem komunisto, sed ĉiam li diris al mi tiujn ĉi vortojn, esencon de politika honesteco: "Marjorie, ni hungaroj petas nur, ke vi objekte rigardu nian landon per la propraj okuloj. Ne kredu tro facile ĉion, kion diros al vi la okcidentaj gazetoj, sed vere rigardu nin, juĝu nin laŭ via propra sincera juĝo".

Ree al Budapeŝto, kie ĉio estis ornamita por la festoj de la "Tago de Liberiĝo", la 4-a de aprilo. Kaj, por la unua fojo, mi renkontiĝis kun Kolomano Kalocsay.

Kiel verve Baghy mokis min, kiel simie li grimacis, kiam, sur la ŝtuparo al la apartamento de tiu geniulo, mi preskaŭ ne plu kapablis marŝi. "Ej, kara diablo! Kio estas kun vi?" Kiel noktpapilio al lampo, mi preskaŭ panike iris al mia dua Majstro... vortoj mankis... spiro preskaŭ mankis. Al tremantaj lipoj mi levis la manon, kiu surpaperigis *Eterna Bukedo*, *Streĉita Kordo*... Sed mia Princo duonbrakumis min: "Jen nia Marjorie".

Mi jam plurfoje diris, ke mi ne estas vere anino de la "skota skolo". (Ĉefe, mi ne estas skotino; kaj skolojn mi ne ŝatas.) Sed post tia bapto, ĉu mi rajtas nei la budapeŝtan skolon?



K. Kalocsay kaj J. Baghy en la hejmo de D-ro Kalocsay.

Konversacio... Mi rajtis fari fotojn. Gentilaj kiel la vasta plimulto da vere grandaj homoj, tiuj du steloj helpeme pozis por mi. Poste mi povis donaci historiajn bildojn al la Movado... Kalocsay montris al mi sian imponan libraron. Kion, en nia literaturo, li ne legis? Vasta scio, ne nur sur la bretoj sed ankaŭ en la kapo. Multaj manuskriptoj: agloj tiuspecaj nestas en paperaĵoj. Kalocsay nun laboradas super kvinvoluma antologio de la mondliteraturo. Kiu alia havus kaj la povon, kaj la volon? Belege Kalocsay laŭtlegas. Kiel delikate

li perceptas metriakajn nuancojn ! Voĉo de orakolo.

Per tramo al mia kunveno. "Tie ĉi ni devas descendi". La nazo de Baghy preskaŭ sparkis. "Ni NE devas descendi ! Ni devas deĝi !" Mi ne riskis ĵeti min inter la eterne batalantaj amikojn; mi malsupreniris. Kalocsay prezentis min al la esperantistoj de Budapeŝto; kaj reklamis min ruĝige. Mi pensas pri la oftaj bagatelemaj ĵaluzoj kaj hon-tindaj rivalecoj de anglaj verkistaj medioj, pri malicaj recenzoj, malaltigaj onidiroj, la kulto de ne-estimo; kaj mi sentis, kiel ofte ke en Esperantujo veraj artistoj amas unu la alian kolege. La aŭdantaro bonege akceptis min.

Sekvis kelkaj plenegaj tagoj en Budapeŝto, kaj ne tra gazetoj, sed per miaj propraj okuloj, mi konstatis ke la sopiro de la hungaroj al mondopaco vere ne estas ia kava slogano : ili ja scias ĝisfunde pri la teruraĵoj de milito; tiu tragika "Martira Strato" memorigas pri la hungaraj judoj kaj aliaj kiuj iris al naziaj amasbuĉejoj; jam tro ofte kaj penige la bravaj hungaroj devis rekonstrui sian belegan ĉefurbon. Jam denove ĝi floras, rekonstruita; ĝi restu nun paca kaj bela ! Per miaj propraj okuloj mi vere vidis indikojn de pozitiva laboro kaj progreso : bonan lernejon, bonegan infanvartejon, kie ni longe interparolis pri temoj de infanpsikologio; noktsanatorion; iaman aristokratan kastelon, kiu ankoraŭ restas bela sed nun utilas al la homoj, estante malgranda hospitalo; rekonstruitan Budapeŝton, urbon denove belan, kortuŝe belan.

Akceptis min tre afable Sinjoro István Kossa, Ministro de Trafiko kaj Poŝtaj Aferoj. Kiu interpretis ? Nu, sinjoroj Baghy kaj Márton ambaŭ ĉeestis, sed interpreton mi tute ne bezonis : s-ro Kossa tuj alparolis min en perfekte Esperanto, kaj ni povis tute senpere kaj nature konversaci. S-ro Kossa troviĝas en la Internacia Patrona Komitato, respondecis pri la du esperantaj poŝtmarkoj per kiuj Hungarujo antaŭ nelonge ĝojigis nin, kaj, laŭ ĉies diro, estas tre amata inter la hungaraj esperantistoj, ĉar li ĉiam lojalis al Esperanto; kaj multfoje en tiu suferinta lando, tia lojaleco postulis la kuraĝon de vera viro. La Ministro eĉ donacis al mi surskribitan libron sian.

Mi ĉeestis publikan kunvenon dum la vespero antaŭ la Tago de Liberiĝo, kaj vidis la nunajn gvidantojn de Hungarujo sur estrado, inter flagoj kaj rozoj; post la kunveno, belegaj, virtuozaĵaj kantado kaj dancado (kompreneble ne de la samaj personoj) regalis nin. Kaj, rigardante per tiu petita objektiveco, mi ne povis ne konstati la kontraston, inter la histeriigaj, kontraŭkulturaj amaskunvenoj de la hitleranoj, kaj la digna, kvietaj, deca kunveno de tiuj aliaj homoj, en kadro de beleco kaj altkulturo. Je la Tago de Liberiĝo mi staris inter Baghy kaj Márton sur honortribuno por rigardi la grandan militistan paradon. Mirinda estis la disciplino, iasence bela : sed mi esperas, ke baldaŭ la mondo vere trovos la vojon al kara paco kaj ne plu bezonos ŝtalajn — karapacojn.

Multaj gravaj hungaroj intervjuis min, kaj mi esperas, ke ili vidis la praktikan interkomprenigan valoron de Esperanto. Mi ofte dankis ilian taktosenton : neniu hungaro iam ajn diris iun vorton kontraŭ mia propra lando aŭ registaro, nek invitis min tosti ion pli priargumentindan ol "Paco" aŭ "Angla-Hungara Amikeco"; ĉiam ili montris la plej ĝentilan delikatecon al fremda gastino, la plej grandan konsideron al okcidenta konscienco. Sed mi ofte rimarkis, en multaj kontekstoj publikaj kaj privataj, la altegan nivelon de hungara afableco al gastino. Belegaj kaj pensigaj estis tiuj tagoj en Budapeŝto.

Baghy akompanis min al sia naskiĝurbo, Szeged. Taŭga lulilo por poeto : antikvaĵoj kaj novaĵoj, tradicioj kaj progreso, troviĝas kune en la urbo : noblaj universitataj klostroj, imponaj teatro kaj preĝejo; novegaspekta ponto kies matematika beleco tuj kvietigas la menson; kaj ĉie florarboj, printempaj floroj, same kiel en la kara koro de nia aŭtuna heroo. Prelego — kun interpreto. Konversacioj kun multaj indaj kaj interesaj esperantistoj.

Mallonga vojaĝo tra la ridetanta kamparo al Hódmezővásárhely, kie mi prelegis denove, ĉi-foje pri mia nun mondrenoma siama kato, kun lumbildoj, kaj laŭtleĝis poemojn. En tiu por anglino nepronebla urbo mi vidis kooperativan bienon kaj ne povis ne admiri la progreson kaj prosperon tie. Kaj kiel tiuj bravaj hungaraj bienuloj amas siajn bestojn ! Bovinoj kaj porkidoj preskaŭ lumis pro pureco. "Ni grasigas la porkojn ĝis ili estas tre bonaj viandbestoj," oni klarigis, "poste ni buĉas ilin". Mi iomete timis, kiam la bravaj bienuloj metis antaŭ min grandegan bongustan tagmanĝon. Ĉu pro simila celo ? Sed ne, kun amiko Baghy (ankoraŭ ne sufiĉe grasa por buĉi) mi foriris sekure, kun pano kaj salo kiel amikec-simbolo.

Al Orosháza : tre bela nova fabrikejo, alia prospera kooperativa bieno; tre amika akcepto, kiel ĉie, de la lokaj gvidantoj; festa tagmanĝo; gajeco, afableco; mi parolis kun interpretanto al granda publika kunveno kaj respondis al multaj demandoj.



Du "junpioniroj" bonvenigis M. Boulton al kooperativa bieno.

Ĉu eble detaloj, pri socia progreso en Anglujo, same surprizis miajn hungarajn gefratojn, kiel la diversrilata socia progreso en Hungarujo surprizis min? Se jes, des pli ni vidas la utilon de Esperanto. (Parenteze, mi ĉie estis tute libera priparoli la vivkondiĉojn en mia lando).

Al Gyula, al alia granda kunveno, amika akcepto, vespera festeno luksa, kaj poste, kun mia konstante kariĝinta akompananto, kiu ĉiam zorgis pri mi kvazaŭ pri propra filino, denove al Budapeŝto, al belega esperantista kunveno vere klimaksa. Flagoj, muziko, ceremonioj... la hungaraj fervoristoj aranĝis la kunvenon, kaj mi facile plumerarus kaj nomus ilin — la hungaraj fervoristoj.

En la unua vico, cezaraspekta Kalocsay. Ho eminenta kuracisto, ĉu estis saĝe, tiel endanĝerigi mian koron? Apud li, mefistofelaspekta Baghy — ĉu mi iam ajn indos paroli antaŭ vi, vera heroo de paco kaj de Esperanto? Apud mi, por min prezenti, Márton. Multaj bravaj batalintoj por nia lingvo rigardis min. Kion mi oferis? Kiom mi suferis por Esperanto? Kaj jen tiuj homoj, inter kiuj multaj iam riskis martiriĝon por Esperanto. Maria Kenesei multe monofaris, dediĉite laboradis, riskis; aliaj eĉ fidelis en terorejoj de la Gestapo... Dum mia vivo, mi neniam sentis min pli humila, ol en tiu kunveno, kunvokita por min honori! Al ili do, al la hungaroj, kiuj komprenas tiajn aferojn, mi promesis ke — "mi restos fidela".

Mi neniam parolis al pli kortuŝe respondema aŭdantaro. Poste, amaso da geamikoj eskortis min al vespermanĝo. Inter Kalocsay kaj Tárkony mi vespermanĝis. Antaŭ mi sidis amiko Reiber, kies tradukoj jam plurfoje ĝojigis nin en *Norda Prismo*; ne malproksime, Sándor Szathmári, nia eminenta satiristo. Mi palpebrumis inter tia galaksio de verdaj steloj. S-ro Márton demandis al mi, ĉu mi volos iam reveni al Hungarujo, denove prelegi...? — Ho, amiko, ĉu anasino volos naĝi?

Budapest-Keleti, la granda stacidomo, je nesimpatia frumatena horo. Floris la ĉielo. Multaj manpremoj. Arde pia kiso sur la vango de Julio Baghy. Li meritis mil tiajn. La vagonaro ekiris brue. Larvoj vualis miajn okulojn.

Milojn da vortoj mi povus skribi pri Hungarujo, kaj ĉiu frazo menciis ian afablaĵon, ion belan aŭ interesan, iun hungaron kiu gastigis min, helpis min, bone interpretis, ĉiumaniere glatis antaŭ mi la vojon. Ne estas spaco por diri ĉion. En tiu multe suferinta lando, la naŭjara revo de esperantista verkistino plenumiĝis. Ĉiu dankesprimio maladekvatus.

Mi revenis kun preskaŭ nekredbla amaso da belaj, interesaj donacoj; sed mi ankaŭ revenis kun koro kaj menso lume plenaj de inspiroj, instigoj, verkista kuraĝo. Karaj kolegoj, vi heroaj soldatoj de la militojaroj, de la noktdeĵoro, mi salutas kaj dankas vin!

Marjorie Boulton

OKAZE DE LA ZAMENHOF-JARO

MALLONGAJ INFORMOJ

Speciala eldono de "Aŭstralia Esperantisto": Jus aperis speciala eldono de la revuo "The Australian Esperantist" dediĉita al la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. Tiu ĉi numero havas 20 paĝojn, estas presita dukolore kaj eldonita en 3.000 ekzempleroj nur en la angla lingvo. Ĝi entenas la Deklaracion, la nomojn de la membroj de la Internacia Patrona Komitato, artikolojn de s-roj Fred Williams, D-ro R. G. Robbins, F. R. Banham, C. J. Caldera, M. Leereveld, Ken Linton, Herbert Koppel kaj R. L. Harry. Utilaj informoj pri la Esperanto-organizaĵoj en Aŭstralio ebligas al la legantoj sin turni al la ĝusta adreso por ricevi pliajn sciigojn. En la fino estas aldonitaj kelkaj pensoj de Zamenhof en Esperanto kun anglalingva traduko. Entute bonega eldono, altnivela ankaŭ laŭ la aspekto.

Pliaj Esperanto-stratoj kaj placoj: Okaze de la Zamenhof-Jaro jenaj urboj aŭ vilaĝoj en Bulgarujo nomis stratojn aŭ placojn je la nomo de Zamenhof aŭ Esperanto: Varna, Str. D-ro L. L. Zamenhof kaj aŭtobushaltejo Esperanto; Asenovgrad, Placo Esperanto; Kubrat, Strato Esperanto kaj Strato D-ro L. L. Zamenhof; vilaĝo Slavjanovo, regiono de Pleven, Strato Esperanto; vilaĝo Polski Trambes, regiono de Tirnovo, Parko Esperanto; Pazarĝik, Aleo Esperanto (en la urba parko); vilaĝo Govedarci, regiono de Samokov, Loko Esperanto. En Bulgarujo jam ekde 1942 ekzistas Strato Esperanto en Sofia, dum insulo en la Danubo, apud Orjahovo, nomiĝas "Esperanto" ekde 1934. La raporto plue diras: "La nomigo de stratoj kaj placoj en Bulgaraj urboj kaj vilaĝoj estas daŭrigata". Gratulon al la bulgaraj esperan-

tistoj. Ĉiu loka grupo en la mondo devus en la Zamenhof-Jaro almenaŭ klopodi nomigi unu straton aŭ placon je la nomo "D-ro L. L. Zamenhof" aŭ tiu de "Esperanto".

Pliaj broŝuroj pri la Zamenhof-Jaro: Germana Esperanto-Asocio eldonis en 10 mil ekzempleroj la broŝuron pri la Zamenhof-Jaro en la germana lingvo. Ĝi estas luksa eldono kaj enhavas la samajn dokumentojn kaj artikolojn, kiel la broŝuro eldonita de U.E.A. en Esperanto, en la angla kaj franca lingvoj. La gazetara servo de la Centra Dana Esperantista Ligo eldonis la broŝuron stencilite, sed tamen la aspekto estas tre bona. Franca Esperantisto publikigis la materialojn en la n-ro de marto-aprilo 1959, dum "Esperanta Finnlando" publikigis parton de la materialoj, presite, en la numero 4. Ĉiuj landaj asocioj kaj aliaj organizaĵoj, kiuj publikigis la broŝurojn aŭ aliajn materialojn okaze de la Zamenhof-Jaro, estas petataj sendi almenaŭ du ekzemplerojn al CED kaj alian ekzempleron al la adreso de la 44-a Universala Kongreso de Esperanto por la ekspozicio tie.

Artikoloj: Pliaj artikoloj pri Zamenhof aperis en la monda gazetaro. La informaj fakoj kaj la diversaj kunlaborantoj estas insiste petataj sendi urĝe eltranĉaĵojn kun tiuj artikoloj, kiel ankaŭ kiun ajn alian presitan materialon, publikigitan okaze de la Zamenhof-Jaro, al la adreso de la 44-a Universala Kongreso de Esperanto, kie ĝi estos ekspoziciita.

KOREKTO

En la junia numero de "Esperanto" 1959 enŝteliĝis ĝena eraro. Sur paĝo 104, maldekstra kolumno, 22-a linio oni bonvolu legi "das tragische Steineschweigen" anstataŭ "das trågische Steinenschweig".

Gratulojn al Jan kaj Julja Isbrucker

Okaze de la kvindekjara datreveno de ilia aliĝo al nia movado en 1909 la esperantistaro gratulas kaj dankas al du grandaj pioniroj s-ino Julja Isbrucker, fondintino de la Universala Ligo, kaj inĝeniero Jan Isbrucker, prezidanto de nia Akademio. Ambaŭ ludis kaj ludas tiel gravan rolon sur la nederlanda kaj tutmonda kampoj ke malfacile oni povus mezuri ĉion, kion Esperanto ŝuldas al ili.

Neniam mi forgesos ilian amikan akcepton en Hago en 1920, kiam ili organizis nian unuan kongreson post la malgaja kaj detrua tempo de la unua mondmilito. Dum ses jaroj silentis la voĉo de "La Espero" kaj sonis nur kanonoj kaj malbenoj en Eŭropo. Mortis d-ro Zamenhof mem kaj miloj da bonaj samideanoj. Ŝajnis ke la esperantista familio estis disrompita kaj la pacienca laborado de kvarcentjaro nuligita.

Subite, trans doloroj kaj ĉagrenoj, eksonis la invito al Hago kiel matena sonorilo post malluma nokto. La kuraĝo de tiuj du nederlandaj gejunuloj redonis al ni ĉiuj la ĝojon en la koro kaj la kaŭzon vivi kaj rekonstrui. Nia entuziasmo rekreskigis flugilojn al la tuta movado. En la Salono de la Kavaliroj sub la historia plafono resonis la muziko de "La Espero" kaj revarmiĝis la decidemo por ĉion brave rekomenci.

De post tiu renkontiĝo rekunvenis regule niaj kongresoj, pli kaj pli multnombre ĉeestataj, kaj ankaŭ niaj teknikaj konferencoj, unu post alia, dum la Paska libertempo. Fidele partoprenis ĉion Jan kaj Julja Isbrucker, de tiam agemaj gvidantoj ankaŭ internacie. Ilia kunlaboro kaj amikeco min subtenis konstante en la plej malfacilaj horoj de la reorganizo. Lia saĝo, ŝia sindono, iliaj grandaj talentoj alportis al nia movado nemezureblan forton.

Kiu imagus kongreson sen iliaj konataj figuroj, sen lia sprita humoro, sen ŝia digna elokventeco? Kiel inĝeniero pri elektro-tekniko li min ekinteresis pri radio kaj kaŭzis mian decidon fondi Radio-Genève en 1925 kaj kunvoki internacian konferencon de radio-stacioj, kiun li prezidis en Esperanto la saman jaron en Genevo. Kiel sperta kursestrino kaj aŭtorino de lernolibroj ŝi invitis Andreon Ĉe veni Nederlandon kaj ŝi fondis instituton kaj Esperanto-domon en Arnhem, kie li povu prepari taŭgajn instruantojn laŭ sia mirinda metodo. En 1928 ŝi organizis en Hago la interreligian kongreson por paco, sed la fortoj de malamo estis pli potencaj en Eŭropo.

Dua mondmilito denove rompis la fadenojn kaj detruis ĉion. De 1940 ĝis 1945 Nederlando konis suferigan invadon kaj regadon de fremdaj militistoj. Fortranĉita de la mondo, la familio Isbrucker eĉ konis malsaton kaj manĝis foje tulipajn bulbojn. La inĝeniero fariĝis profesoro de matematiko en superaj lernejoj, post la liberiĝo de sia lando li rekonstruis nian lingvan komitaton kaj kreis la nunan Akademion, kiun li nun prezidas akurate kaj senpartie. En niaj kongresoj li, jaron post jaro, reprezentas la nederlandan registaron.

S-ino Isbrucker fariĝis pioniro de la mondfederalista movado kaj fondis por tiu celo la Universalan Ligon kun Esperanto kiel sola oficiala lingvo. Ĝian organon "La Praktiko" gvidas Andreo Ĉe, kiu ankaŭ rekomencis sian talentan preparadon de instruaj misiistoj por la tuta mondo.

Gesinjoroj Isbrucker kune tradukis en nian lingvon la belan verkon de Limburg Brouwer pri Akbar, la fama tolerema imperiestro de Hindujo en la tempo de Elizabeto de Anglujo kaj Henriko IV de Francujo. La edzo verkis en Esperanto librojn pri la Evoluo de Telefonio kaj pri Historio kaj Organizo de la Esperanto-movado. La edzino tradukis la libron de R. Bulhuis "La Alia Pasinteco", tiun de Martin Kojc "Lernolibro de la Vivo" kaj la ĉarman "St. Nikolaon" de Theo Ramaker. Lastatempe ambaŭ laboris kaj ĝojis pro la grava sukceso de vasta Esperanto-lernado kaj aliĝado el la multnombra legantaro de nederlanda ĵurnalo. Ni ĝojas kun ili.

Al tiuj du fidelaj pioniroj kaj amikaj homoj, veraj homaranoj, ni bondeziras kaj dankas tutkore pro la duoncentjara fideleco al la celo de Zamenhof. Vivu Jan kaj Julja Isbrucker!

Edmond Privat



*La senlaca simpatia paro
S-ino Julja Isbrucker kaj
Inĝ. J. R. G. Isbrucker*



Prof. D-ro Edmond Privat sepdekjara

Guste antaŭ presigo de tiu ĉi numero atingis nin la informo ke Prof. D-ro Edmond Privat, Honora Prezidanto de U.E.A., en aŭgusto festos la sepdekan datrevenon de sia naskiĝtago. Niajn plej varmajn bondezirojn kaj gratulojn ni direktas al tiu ĉi eminenta kaj nobla homo, kiu havas tiel elstarajn meritojn por la Esperanto-Movado, kiel ankaŭ ĝenerale por la defendo de la monda paco kaj la respektigo de la homa digno. Kun plezuro ni presigas la ĉi suban artikolon de G. Agricola verkitan je tiu ĉi okazo.

La Estraro de U.E.A.



Je la 17-a de Aŭgusto 1959 Doktoro Edmond Privat finos sian sepdekan vivjaron. Volonte ni ĉi tie diras pri tio kelkajn vortojn de danko kaj de bondeziro. Malmultaj estas tiuj, kiuj havis la avantaĝon sekvi tiun ĉi vivon riĉan je valora agado homara de la komenco, ni precizigu de la unua kongreso de Esperanto en Bulonjo ĉe Maro. Sed plimulto nuna konas la nomon de tiu ĉi ĝenevano kies nomo estas ligita je aro da penadoj por plibonigi staton socian kaj ĝenerale homan de nia mondo.

Por ni Esperantistoj, Edmond Privat estas la brila oratoro, la elegantstila verkisto kaj la absolute senpartia prezidanto, kiu eĉ en komplikaj situacioj sukcesis trovi liberigan formulon. Lingvisto subtila, reganta skribe kaj oratore plurajn lingvojn kun agrabla parolmaniero, jen proksimume la kvalitoj videblaj. La nevideblaj ecoj estas la laborvolo kaj -povo, kio ebligas al li ankoraŭ nun plenumi aron da taskoj, kiuj por juna viro estus ŝarĝo elĉerpiga.

Edmond Privat apartenas al tiu aro da ĝenevanoj, kiuj depost la instaliĝo de la reformo honoris la malgrandan civiton per agado tuthomara, el kiuj ni citu nur kelkajn el la pasinta jarcento: Jean Gabriel Eynard, Henri Dunant, Jean Jacques de Sellon.

Edmond Privat apartenas precize al tiu ĉi aktiva rondo de ĝenevanoj kiuj serĉis realigi la esencajn ideojn de la Hom-raĵtoj. Preterpasante ni memorigu ke estis Ĝenevo kie fondiĝis la unua societo por la paco (1820).

Tia estis kaj estas ankoraŭ nun la medio en kiu naskiĝis kaj vivis Edmond Privat. Ne estas la loko tie ĉi por detale memori kion li faris por la idealo

de D-ro Zamenhof, kiu mem, antaŭ ol lin kaptis la ideo "krei" lingvon estis "homarano". Neniu alia ol Edmond Privat konis tiom bone la Majstron, kies vivon li tiel kortuŝe priskribis.

Sed ankaŭ li devis sperti la "malicon de l'tempo". Plej forta seniluziigo pri la naturo kaj povo de l'homo estis la kolosa laboro por akceptigi favoran decidon pri Esperanto ĉe la estinta Ligo de Nacioj. Seniluziiga pro tio ke precize decidantaj homoj, daŭre proklamintaj belajn frazojn pri komunaj devoj kaj rajtoj de la homaro, en taŭga momento ne sekvigis per ago la parolojn. Jam tute proksima je la celo, Edmond Privat vidis kiel Mozeo la benatan landon, sed ne rajtis eniri. Kaj la "benata lando" por ni Esperantistoj, estis kaj estas la enkonduko de nia lingvo kiel instrufako en la lernejoj. Malgraŭ tiu ĉi epizodo jam forgesita, Edmond Privat restas fidela al juneca idealo, laboris kaj sukcesis multilate efektiviĝi progresojn. Kiel fino de tiu ĉi memorigo staru la belaj vortoj de Antoni Grabowski:

*Ni velas antaŭen kun kredo, fervor',
Benante la Majstron pro verko,
Kaj lian anaron, de plej frua hor'
Fidelan al li, ĝis la ĉerko.*

*La mond' aliĝos, la temp' pasos for'
Sed vivos eterne pri ili memor'.*

G. Agricola

CED

Centro de Esploro

kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo
Telefono ARNold 90-81

Esperanto en la Lernejoj

En tiu ĉi Zamenhof-Jaro estas necese havi plenan kaj fidindan statistikon pri A/ Geinstruistoj kiuj estas esperantistoj, kaj B/ Lernejoj, en kiuj dum la nuna lerneja jaro oni instruas Esperanton. Tiucele CED entreprenis enketon pere de sia kunlaboranto, s-ro David Kennedy. Detalaj informoj aperis en la rubriko de CED, sur la p. 67 de la revuo "Esperanto", aprilo, 1959. La fiksita limdato estis fino de julio. Bedaŭrinde tro malmultaj geinstruistoj respondis ĝis la nuna momento al la enketaj demandoj kaj tial CED plilongigas la lastan limdaton por sendo de la respondoj ĝis la 1-a de oktobro 1959.

CED ripetas la demandojn :

Enketo B/ Lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata.

Ĉiuj aktivaj aŭ emeritaj geinstruistoj kaj geprofesoroj, kiuj parolas Esperanton kaj kiuj instruas(is) kiun ajn objekton en kiu ajn lernejo aŭ universitato, estas petataj respondi al jenaj demandoj: (1) Lando; (2) urbo; (3) nomo; (4) adreso; (5) ĉu aktiva aŭ emerita; (6) nomo de la lernejo (naci-lingve kaj Esperante) en kiu vi instruas aŭ, se emerita, laste instruis; (7) grado de la lernejo sub (6) laŭ la leĝoj de via lando: ĉu elementa, mezgrada (liceo, gimnazio ktp.) aŭ altgrada (universitato aŭ samranga altlernejo); (8) objekto(j), kiu(j)n vi instruas(is); (9) ĉu vi estus preta, en okazo de bezono, instrui Esperanton en via lernejo aŭ en alia lernejo de via urbo aŭ loko? (10) dato kaj subskribo.

Enketo B/ Lernejoj en kiuj Esp. estas instruata

Ĉiuj geinstruistoj kaj geprofesoroj, kiuj instruas Esperanton en kiu ajn lernejo aŭ universitato, estas petataj respondi al jenaj demandoj: (1) Lando; (2) urbo; (3) nomo de la lernejo (naci-lingve kaj Esperante); (4) tipo de la lernejo: a/ elementa (aĝo ĝis proks. 12 jaroj), b/ mezgrada (aĝo proks. 12 ĝis 18 jaroj), c/ universitato aŭ samranga altlernejo (aĝo proks. 18 ĝis 24 jaroj); (5) ĉu por knaboj-studentoj, knabinoj-studentinoj aŭ mik-sita; (6) nombro de gelernantoj laŭ la seksoj; (7) ĉu Esperanto estas instruata oficiale aŭ neoficiale, devige aŭ nedevige, en la kadro de la lerneja programo aŭ ekster ĝi; (8) kiom da jaroj oni jam instruas Esperanton; (9) nomo kaj adreso de la instruist(in)o aŭ profesor(in)o; (10) dato kaj subskribo.

La respondoj al la supraj demandoj de ambaŭ enketoj *nepre* estu skribitaj sur aparta folieto de papero aŭ sur aparta poŝtkarto. Ne skribu sur la sama papero pri aliaj aferoj. En ambaŭ enketoj la

respondoj precize sekvu la vicordon de la demandoj. *Ĉiujn respondojn al ambaŭ enketoj bonvolu sendi al la kunlaboranto de CED por lernejaj demandoj s-ro David Kennedy, 21 Westfield Road, Bishop Auckland, Co. Durham, Britujo.*

Ĉiuj legantoj, se ili mem ne estas instruistoj aŭ profesoroj, estas petataj atentigi siajn gekonatojn geinstruistojn aŭ geprofesorojn pri la du enketoj. La Esperanto-gazetoj estas petataj represii la alvokon al la geinstruistoj respondi al la enketaj demandoj.

Esperanto en Komerco

Interkonsente kun CED, la Esperanto-Klubo en Milano komencis kompiladon de internacia adreso de entreprenoj, kiuj povas uzi Esperanton en siaj internaciaj rilatoj. Tiucele estas starigita en Milano speciala "Centro por Esperanto en la Komerco, Industrio kaj Turismo". Ĉiuj esperantistoj estas varme invitataj kunlabori en la kolektado de tiaj adresoj. Multaj esperantistoj estas oficistoj aŭ direktoroj de diversaj komercaj firmaoj kaj aliaj entreprenoj, kaj sekve la koncernaj entreprenoj povus doni sian nomon por la adreso. La esperantistoj, kiuj pro siaj menciitaj oficoj povus korespondi en la nomo de sia firmao en Esperanto, estas petataj sendi al la menciita "Centro" (Piazza Oberdan 1, Milano, Italujo) la nomon de la firmao kun ĝia adreso kaj kun la konsenta letero de la entreprenoj. Oni ne petas monoferon. La nomoj de ĉiuj entreprenoj aperos en speciala jarlibro.

Originala poezio en Esperanto

La kunlaboranto de CED, s-ro E. Ockey, kompilis liston de libroj, kiuj enhavas originalajn poemojn en la Internacia Lingvo. La listo enhavas titolojn de 123 libroj kun tiaj originalaj poemoj. La listo ne estas kompleta, sed ankaŭ tiel nekompleta ĝi montras la floradon de la esperantlingva poezio.

Bravo, Hago!

La 13-an de junio granda festo signis la finon de la gazetkurso "De Posthoon" en Hago, Nederlando, la plej granda Esperanto-kurso de la nuntempo, incitita kaj gvidata de S-ro Harry Kervers.

Bele per floroj kaj flagoj ornamita scenejo, instiga parolado de la kursgvadanto, impona bendparolado de la Honor-Ministro, antaŭa Ĉef-Ministro D-ro W. Drees, gaja konversacia leciono de Andreo Cseh, paroladoj de itala kaj rumandevena esperantistoj Pompilio kaj Pragano, bonega, sprita, purlingva dankparolado de kursano-kuracisto (kaj amatora aktoro) D-ro Vaandrager kun valoraj donacoj por ĉiuj kunlaborintoj, distraj programoj de tri kursanoj-muzikistoj, bona librostando de kursano-librovendisto kaj fine gaja balo!

Lerta enketo farita inter la preskaŭ 1500 kursanoj montris la statistikfakulon, kiu estas S-ro Kervers. Bona bazo ĝi estas por la daŭrigaj kursoj de ĉiuj diverstendecaj grupoj, pri kiuj la kursanoj jam ricevis presitan broŝuron. Ekzemplo de modela kunlaboro en ĉies intereso....!

Elĉerpita sed feliĉa estis gratulinda familio Kervers. Gepatroj kaj filinoj, ĉiuj havis sian parton en la multmonata laboro. Ili faris sian faron en la Zamenhof-Jaro!

M. H. V.

La informado pri la Internacia Lingvo en la jaro 1958

Kiel en la antaŭaj jaroj, ankaŭ en tiu ĉi la Informa Fakto de UEA entreprenis enketon pri la informa laboro farita en la jaro 1958. La rezultoj estas publikigitaj en tiu ĉi numero de "Esperanto" en formo de tabela trarigardo.

Kion diras la tabelo ?

La tabela trarigardo estas kunmetita surbaze de la respondoj al enketa demandaro, donitaj de la landaj informaj faktoj, de la landaj asocioj, se speciala informa fakto ankoraŭ ne estas fondita, aŭ de la rektaj kunlaborantoj en landoj sen organizita Esperanto-movado. Estas necese diri, ke bedaŭrinde pluraj landaj asocioj ne nur ankoraŭ ne formis specialan informan fakton, sed eĉ tute ne respondis al la demandaro malgraŭ la pluraj urĝigaj cirkuleroj kaj leteroj. Pro tiu neglektado de elementaj devoj, la tabelo ne estas kompleta. El la aliĝintaj landaj asocioj, la argentina, aŭstralia kaj monaka donis nenian vivosignon, kvankam certe almenaŭ io estis farita sur la kampo de informado ankaŭ en tiuj landoj. El la nealiĝintaj organizaĵoj nenian respondon donis la ĉeĥoslovaka, helena, islanda, izraelanda, meksikia, rumana kaj sudazia. La Ĉina Asocio almenaŭ sendis eksplikitan leteron.

Malgraŭ tiuj gravaj mankoj, la tabela trarigardo tamen montras plian progreson kompare kun la jaro 1957. Tio rilatas la ĉiuj rimedoj de informado : artikoloj, gazetsĉigoj, prelegoj, radioprelegoj, ekspozicioj, afiŝoj, flugfolioj, broŝuretoj. La plej bonajn rezultojn donis tiuj informaj faktoj, kiuj estas organizitaj kaj kiuj agas konforme al la "Fundamenta Principaro" de Frostavallen (v.p. 186-190 de la Jarlibro, 1959). Tiajn informajn faktojn fondis nur la brazila, bulgara, hungara, itala, jugoslavia, nederlanda, norvega, pola, sveda, urugvaja landaj asocioj. Efektive brilajn rezultojn atingis la brazila, itala, jugoslavia kaj sveda informaj faktoj. La germana estis en 1958 konsiderinde helpata de la Kongresa Gazetara Servo. Progreson faris ankaŭ kelkaj aliaj landaj asocioj, respektive iliaj komisiitoj por informado. Plej sisteme, observante ĉiujn metodojn kaj rimedojn de informado, laboris ankaŭ en 1958 la Itala I.F., gvidata plue de s-ro R. Pennazio, kaj la Jugoslavia I.F. administrata jam dum kelkaj jaroj de s-ro M. Gjiwoje. Kelkaj partoj el la akompana raporto de la Itala Inform-Oficejo, meritas specialan atenton, ĉar la laboro de tiu I.F. povas kaj multrilate devus esti imitata de la aliaj laborantoj sur la kampo de informado. La raporto diras :

"Laŭ la programo, starigita de la Inform-Oficejo komence de 1958, oni sin adresis al novaj medioj kaj precipe oni planis novajn kampanjojn, kiuj ne rilatas al la temoj de la supraj demandoj : sinturno al la urbestroj, por ke ili respondu al

enketo de eŭropaj urbestroj; peto al urbestroj nomi straton aŭ placon je la nomo de Zamenhof aŭ Esperanto... Rilate la radion, oni devas noti, ke, se malpliigis la nombro de nacilingvaj prelegoj, tamen tiuj de 1958 estas preskaŭ ĉiuj disaŭditaj en tutlandaj programoj, dum en la pasinteco temis precipe pri prelegetoj dissenditaj de lokaj stacioj. La koncernaj ciferoj inkluzivas ankaŭ televidajn elsendojn... Rilate la gazetaron: multe pli da artikoloj kompare kun la informoj; la temoj pritrakitaj pli funde; evidentigis grupeto da profesiaj ĵurnalistoj (eĉ gravaj), kiuj estas veraj amikoj de la Esperanto-Movado. Oni sukcesis eldoni novajn turismajn esperantlingvajn prospektojn (Como, Padova, Palermo, Ragusa, Sciacca). Prelegoj okazis precipe en universitatoj, mezgradaj lernejoj, popolaj universitatoj, kulturaj asocioj, junularaj organizaĵoj. Tiucele estis utiligataj precipe la datrevenoj de UNESKO, Deklaracio de la Homaj Rajtoj, Zamenhof-Tago. Rezulte de tiu tuta agado ĉiam pli da aŭtoritatuloj (urbaj, provincaj, tutlandaj) helpas kaj subtenas nian Movadon. En kvin urboj estis prezentitaj Esperanto-filmoj, sed en multe pli da aliaj tiaj filmoj estis prezentitaj en diversaj lernejoj. Laŭ la sugesto de la Inform-Oficejo, ses gravaj urbaj bibliotekoj ricevis donace Esperanto-librojn. Laŭ la instigo de la I.O. oni starigis pli da elmontrofenestroj kun esperantaĵoj en konvenajn publikajn lokojn, tiel ke ili restadas antaŭ la okuloj de la civitanoj dum monatoj".

Pri la unuopaj eroj

Nun kelkaj precizigoj pri la unuopaj kolumnoj en la tabelo :

Artikoloj : Estas enkalkulitaj ĉiuj artikoloj, kiuj pritraktis la Internacian Lingvon. El tiuj artikoloj nur tute malgranda nombro estis malfavora. Ekzemple, en Germanujo el 1761 artikoloj nur 7 estis malfavoraj. En kelkaj landoj aperis eĉ ne unu artikolo malfavora al Esperanto. Ĝenerale la artikoloj objekte prezentis la problemon, la signifon kaj kulturan valoron de Esperanto. Tamen, escepte, en ili troviĝis fantaziaĵoj, kiuj havas nenion komunan kun la realo.

Prelegoj : Temas pri prelegoj, faritaj en kiu ajn medio, pri Esperanto. Kvankam ankaŭ la nombro de prelegoj kreskis je proksimume 10% kompare kun la pasinta jaro, tamen tiu metodo de informado estas ankoraŭ tro malmulte utiligata. Espereble almenaŭ nun, en la Zamenhof-Jaro, la nombro de prelegoj estos multe pli granda. Efektive, almenaŭ ĉiu profesoro kaj instruisto, kiu scias Esperanton, devus fari po kelkaj prelegoj en sia universitato aŭ lernejo. Por prelegoj pri Zamenhof povas bonege servi kiel bazo la studo de Prof. Waringhien, jam sendita al ĉiuj I.F. kaj landaj asocioj, sed havigebla ankaŭ de unuopuloj

TABELA TRARIGARDO PRI LA INFORMA LABORO EN 1958

Landa Asocio aŭ teritorio	Adreso de la Informa Fako aŭ kunlaboranto	Nombro de		Prelegoj		Radio pre- legoj	Ekspozicioj		Disdonitaj afiŝoj, flugfolioj, broŝuroj	Ĉu la intere- siĝo pri Esp. kreskis?
		arti- koloj	infor- moj	Nom- bro	Ĉees- tintoj		Nom- bro	Ĉees- tintoj		
Aŭstria	Aŭstria Esp. Federacio, Fünf- hausgasse 16, Wien, XV.	89	350	10	450	18	1	200	8.000	Kresketis
Belga	Esperanto-Office, 18, Rue de Franquenes, Ottignies (Bra- bant).	150	200	2	70	—	2	?	3.000	Malkreskis
Brazila	Prof. D-ro Carlos Domingues, Rua Alvaro Alvim, 27, Rio de Janeiro.	3.000	5.500	120	8.000	1.800	8	50.000	40.000	Sama
Brita	BEA, 140, Holland Park Ave. London, W. 11.	30	502	100	2.000	5	6	50.000	10.000	Kreskis
Bulgara	N. Nikolov, Poŝtkesto 44, Sofia.	84	74	35	6.000	32	16	10.000	35.000	Kreskis
Dana	Sven Ziegler, Bjernedevej 62, København.	177	663	—	—	2	3	77.000	13.000	Kreskis
Finna	Informis: V. Setälä, Esperan- totie 4, Matinkylä.	81	56	?	?	?	?	?	?	Sama
Franca	A. Ribot, 11, P. Vergnes, Marmande, (L. & G.).	10	900	255	13.000	60	45	5.000	10.400	Multe kresk- kis
Germana	M. Schumacher, Fehrbellin- str. 5, Köln-Weidenpesch.	1.761	1.441	50	2.500	35	20	2.000	10.000	Kreskis
Hispana	D-ro Rafael Herrero, Str. Calvo Sotelo 11, Valencia.	120	140	30	4.500	104	8	6.000	2.500	Kreskis
Hungara	Marton Lajos, Bors-u. 2, Budapest, XII.	50	730	15	1.000	20	11	7.000	1.000	Ege Kreskis
Itala	R. Pennazio, Casella Post. 248, Torino.	300	870	77	6.400	69	37	43.000	46.000	Trege kres- kis
Japana	Jap. Esp. Instituto, Hongo- Motomati 1-13, Tokio.	111	56	9	400	10	23	40.000	10.000	Kreskis
Jugoslavia	M. Gjivoje, Gornji Trg 31, Ljubljana.	650	700	55	7.000	120	18	11.000	10.000	Tre kreskis
Kanada	W. D. B. Hackett, 362 Soudan Av., Toronto 7.	32	25	7	350	11	2	4.000	3.000	Kreskis
Maroko	Jean Ronda Ivars, 78, Rue des Pervenches, El-Menzeh Meknes.	200	100	4	120	1	5	160	450	Progresis
Nederlanda	J. Calado, Vergeetmijniet- straat, Rotterdam.	275	171	6	230	—	5	450	32.000	Kreskis

TABELA TRARIGARDO PRI LA INFORMA LABORO EN 1958

Landa Asocio aŭ teritorio	Adreso de la Informa Fako aŭ kunlaboranto	Nombro de		Prelegoj		Radio pre- legoj	Ekspozicioj		Disdonitaj afiŝoj, flugfolioj broŝuroj	Ĉu la intere- siĝo pri Esp. kreskis?
		arti- koloj	infor- moj	Nom- bro	Ĉees- tintoj		Nom- bro	Ĉees- tintoj		
Norvega	L. Anjer, Boks 942, Oslo.	108	381	7	250	2	1	?	?	Sama
Novzelandia	Sekretario, P.O. Box 3214, Auckland, C. 1.	110	100	26	1.300	3	8	10.000	6.000	Kreskis
Pola	D-ro B. Sadowski, Rako- wiecka 43a Warszawa 12.	25	382	17	3.000	60	7	5.000	28.000	Multe Kres- kis
Sveda	Jan Strönne, Amiralsgatan 36, Malmö.	231	664	171	13.000	17	5	250.000	22.000	Kreskis
Svislanda	D-ro A. Baur, Hangweg 57, Liebefeld-Bern.	100	—	3	250	—	3	250	16.000	Sama
Soveta Unio	Informis S. V. Sariĉev, P.K. 1259, Moskva, K-19.	465	—	—	—	—	—	—	—	
Urugvaja	Rubens Barbieri, Río Branco 1556 ap. 601, Montevideo.	25	30	2	100	3	1	200	1.400	Sama
Usona	ELNA, 808, Stewart St. Mead- ville, Pennsylvania.	100	50	?	?	2	3	?	300	Kreskadas
Venezuela	Oscar de Diego, Apartado del Este 4845, Caracas.	—	4	—	—	9	—	—	25	Kreskis
26 respondoj	ENTUTE	8.284	14.089	1.001	69.920	2.383	238	661.260	308.075	Kreskis
29 respondoj	Komparaj ciferoj por la jaro 1957.	7.817	10.508	909	69.430	2.367	194	957.180	251.000	Kreskis

por 3 respondkuponoj de la C.O. de UEA. Por prelegoj pri Esperanto abunda materialo troviĝas en la verko "La Internacia Lingvo". Ankaŭ en aliaj verkoj, eldonitaj lastatempe, troviĝas taŭgaj materialoj.

Radio-prelegoj: Estas enkalkulitaj ne nur la prelegoj, intervjuoj kaj pli longaj informoj pri Esperanto en la naciaj lingvoj, sed ankaŭ la televidaj programoj rilate Esperanton. Ne estas enkalkulitaj la 1560 Esperanto-elsendoj, sed kompreneble ankaŭ tiuj elsendoj kaj la informoj pri ili kontribuis al informado.

Ekspozicioj: Tiu ĉi bonega rimedo ankoraŭ ne estas sufiĉe utiligata. Bona ekspozicio kun multaj Esperanto-libroj, gazetoj, revuoj, trafikaj grafikaĵoj estas unuaranga rimedo de taŭga informado.

Afiŝoj, flugfolioj k.s.: Kelkaj landaj asocioj, kiel vidiĝas el la tabelo, dediĉis grandan atenton al tiu formo. Se ĝi estas ligita kun la aliaj, taŭge planitaj, rimedoj de informado, tiu formo multe helpas al

disvastigo de la lingvo. Oni devus utiligi pli vaste ankaŭ ĝin.

En pluraj landoj oni aplikis ankaŭ aliajn manierojn de bona informado. *Reklamoj* en kinejoj estis utiligataj en Aŭstrio. *Televideon* utiligis la brazila, pola, itala kaj germana I.F. En Londono estis reklamoj en la *subtera fervojo*. *Vitrinoj* kaj *mon-trofenestroj* en publikaj lokoj, precipe en trafikplenaĵoj, troviĝis en pluraj urboj de Bulgarujo, Germanujo, Italujo kaj Jugoslavio. *Prelegvojaĝojn* de alilandaj prelegantoj organizis pluraj landaj asocioj. Bonegaj rezultoj atingitaj en Francujo. *Artikoloj pri gravaj libroj*, verkitaj originale en la Internacia Lingvo, aperis en seriozaj literaturaj kaj kulturaj revuoj de Bulgarujo kaj Jugoslavio. Anoncoj en gazetoj estas praktikataj en Svedujo. Diversaj *kampanjoj*, iniciatitaj kaj organizitaj de la Informa Fako de UEA (ekzemple okaze de la datreveno de la Universala Deklaracio) donis bonegajn rezultojn en pluraj landoj. Tiuj metodoj povas esti imitataj en aliaj landoj.

El la tabelo, kompreneble, ne vidiĝas la laboro, kiun faras UEA sur la kampo de informado. Ĝi konsistas el organizado de la tuta informa laboro en mondaj kadroj laŭ la principoj de Frostavallen, en liverado de artikoloj kaj informoj, donado de sugestoj, instigado al partopreno en mondaj kampanjoj, Kongresa Gazetara Servo k.t.p. La I.F. de UEA rilatas tiucele kun ĉiuj landaj informaj fakoj, landaj asocioj, rektaj kunlaborantoj, membroj de TEJA. Entute ĉ. 400 ekzempleroj de ĉiu cirkulero, prelego, informo aŭ alia materialo estas regule dissendata tra la mondo. La Bulteno de la Internacia Gazetara Servo estis regule eldonata dum 1958 kaj ĝis la fino de tiu jaro entute estis publikigitaj 79 numeroj kun kelkaj centoj da informoj. Al la landoj sen organizita movado la I.F. de UEA dissendas apartan Bultenon en la angla kaj franca lingvoj (ĝis la fino de 1958 entute 17 numeroj). La 6-lingva flugfolio estas plue distribuata al partoprenantoj de diversaj internaciaj kongresoj. En Hindujo bone laboras ankaŭ sur la kampo de informado s-ino Haudebine. La I.F. de UEA faris ampleksajn preparlaborojn jam en 1958 por taŭga informado en la Zamenhof-Jaro, sed la rezultoj de tiu laboro vidiĝos nur en la raporto por 1959.

La sendubaj progresoj de la monda informado pri Esperanto en la lastaj jaroj ŝuldiĝas grandparte al la kunveno, kiun havis la reprezentantoj de la landaj informaj fakoj en Frostavallen en la jaro 1956. Post trijara laboro estas necese kritike observi la tutan ĝisnunan agadon, konstati la progresojn, trovi la mankojn, lerni el eraroj. Nur tiel estos eble ankoraŭ plibonigi kaj pliampleksigi la informan laboron, atentante samtempe al la du aliaj ĉefaj agadoj: instruado kaj praktikaj aplikoj. Tiujn demandojn pritraktos la jam fama Sveda Somera Semajno en la neoficiala parto de la programo. Por ke la diskutoj kaj decidoj estu same fruktodonaj kiel en 1956, estas necese, ke la plej elstaraj esperantistoj de la mondo, laborantaj serioze sur la kampoj de informado, instruado kaj praktikaj aplikoj de la lingvo, partoprenu en la laboroj de la SSS. La landaj asocioj estas jam invitatitaj doni, se iel eble, eĉ subvencio al taŭga reprezentanto, por ke li aŭ ŝi povu ĉeesti. Frostavallen 1959 signifos komenciĝon de plia, ankoraŭ pli efika, etapo en la disvastigo de la Internacia Lingvo.

I. L.

KIU ESTAS KIU

en la Esperanto-Movado

KELKAJ SCIINDAĴOJ EL LA LABOREJO

Utilas ke la Esperantistaro konu la evoluon de la laboro entreprenita, doni fidindan informon pri samideanoj kiuj distingiĝis iamaniere en la penado por Esperanto. Iom post iom alvenis respondoj al la unua cirkulero dissendita je la unua de Oktobro 1958 el Juan Régulo Pérez, eldononto de la supra verko.

La metodo adoptita por la redaktado kaj kompilado, estas la jena:

a) Ricevitaj proponoj de "kandidatoj" estas notataj sur folioj, nomo, antaŭnomo, loko kaj je la fino la noto: Proponita de

b) Kontrollibro kiu enhavas sisteme la nomojn de ĉiuj Esperanto-Organizaĵoj kun rubrikaj pri: Dato de respondo al nia invito; Dato de admono; Proponas kiel kunlaboranton; - kiel kandidatojn; Rimarkoj de la Redaktoro.

c) Aparta listo de la kunlaborantoj, precipe laŭlandaj kiuj kolektas enlande la deziratajn informojn.

d) Tekstoj ricevotaj individue kaj kolektive estas kopiataj sur duonfolio kaj kun kvin kopioj. Tiuj lastaj servas por sendi al kompetentaj personoj en la movado, kiuj ekzamenas.

e) Pretaj tekstoj alfabeto klasigataj en ses kartonaj kestoj.

d) Aparta registro por la fotoj.

e) Korespondadoj-dokumentoj en granda ordigilo alfa-beta.

Bazo de la laboro estas la personoj cititaj en la "Enciklopedio de Esperanto", aperinta en 1933 kaj la aldono. Kunlaborantoj kiuj akceptis kolekti la informojn kaj prepari ĉion por koncerna lando, aŭ aparta organizaĵo, estas je la fino de Aprilo:

Aŭstrio: S-ano Rajmund Cech, Lindengasse 8-II-11, Wien VII/62. Bulgarujo: S-ano Dolapčiev, 56 Bulv. Dondukov, Sofia. Ĉeĥoslovakujo: S-ano Rud. Hromada, So-

chašká 2, Praha 7. Danlando: S-ano Sv. Dragsted, Vejlemosevej 60, Holte. Finnlando: S-ano Vilho Setälä, Esperanto-Tie 4, Matinkylä, Helsinki. Francujo: S-ano D-ro Jean Couteaux, 38 Rue Ernest Renan, Sèvres S. et O. Hispanujo: S-ano Rafael Gisbert Ave, G-ismo Franco, 338, Barcelona. Nederlando: S-ano P. M. Mabesoone, 122 Pythagorasstraat, Amsterdam-O. S-ano F. Faulhaber, Marathonweg 15-II, Amsterdam-Z. Norvegujo: S-ano C. Støp-Bowitz, Boks 942, Oslo. Novzelando: S-ano J. T. Allan, 12 Lonsdale Crescent, Wellington E. 3. Pollando: S-ano K. Domosławski, Aleja Jedności 14, Puławy. S-ano Roman Sakowicz, Ul. Parafialna 3, Nowa Sól. Svedlando: S-ano Sven Möllestad, Kromfors. Urugvajo: S-ano D-ro R. Zeballos-Morales, Fray Marcos, (Florida). Usono: S-ano D. E. Parrish, 328 West 46 th Street, Los Angeles, 37, Cal. Severa ekzameno de datoj kaj de faktoj postulas tempon. En 1960 la laboro devos esti finita.

Kiel dirite la libro informos pri personoj kiuj sin distingis per sia laborado por Esperanto. Sed venis alia ideo realigota. Aŭ du ideoj. Unua: Parto de la libro estas dediĉata al eminentuloj de la civila vivo, kiuj sin esprimis en verko, en konkreta subteno oficiala aŭ alimaniere favore por Internacia Lingvo kaj Esperanto; kaj ke ne manku la negativa flanko, estas citataj la kontraŭuloj. Krom la kutimaj informoj, nomo, naskiĝo, profesio, rolo en la civila vivo, estos citata la maniero laŭ kiu ili sin esprimis: Teksto en originala lingvo, kie oni ĝin trovas, traduko de la teksto. Do ne temas pri grava persono, kiu por montri sin ĝentila kontraŭ ni faris favoran deklaron momentan sen sekvo konkreta.

Kaj tria parto, nur tre konciza, citas la viktimojn de diversaj teror-regimoj. Citata estas la nomo, loko de deveno, loko de pereco kun dato. La tutaj estas ia honor-tabulo, nur nuda fakto sen komentario.

La redaktoro invitas ĉiujn samideanojn, kiuj povas liveri al li taŭgajn informojn por la du cititaj partoj tion fari. Ili kontribuas al kolektiva verko plej utila, samtempe honorigante tiujn kiuj honoron meritas.

Hans Jakob, Redaktoro

Radio - Babiloj

(26)

La geesperantistoj havas la dissendojn, kiujn ili meritas.

Cu Pola Radio dissendas en Esperanto nur en la Zamenhof-jaro?

La ĉiutaga Esperanto-duonhoron de la Pola Radio estas certe por tre multaj gesamideanoj ĉiutaga granda plezuro.

Agordante mian aparaton posttagmeze je la kvara kaj duono (M.E.T.) je la por mi plej favora ondo de 31,50 m, mi ĉiutage kun granda ĝojo rekonas la entuziasmigan fanfaron, per kiu la Pola Radio malfermas sian Esperanto-duonhoron. Tiam mi estas certa, ke mi ĝuste agordis. Forprenas ĉiun dubon la anonco:

"Parolas Varsovio, la naskiĝurbo de Esperanto!"

Tute ne mirige, ke la radio-stacio en la naskiĝurbo de Esperanto havas Esperanto-programerojn. Nobleco ja devigas!

Sed ni iom miras, ke tiu stacio ne havis Esperanto-dissendojn antaŭ la Zamenhof-jaro. Krome ni demandas, ĉu la Pola Radio daŭrigos sian Esperanto-duonhoron ankaŭ post la 44-a Universala Kongreso de Esperanto kaj post la Zamenhof-jaro.

Tio verŝajne dependos ne nur de la gearanĝantoj de la Esperanto-programeroj de la Pola Radio, sed precipe de la..... geaŭskultantoj en la propra kaj pluraj aliaj landoj.

El la merkreda koncerto kun bondeziroj kaj la jaŭdaj respondoj al geskribintoj oni povas konkludi, ke la geaŭskultantoj al la Esperanto-programo de Varsovio loĝas en la plej diversaj landoj de Eŭropo kaj Azio. Do la programo estas aŭdebla en tre granda teritorio kaj valoras por tre multaj gesamideanoj. Verŝajne nur la plej aktivaj skribas al la stacio por esprimi siajn dankon, laŭdon, kritikon, dezirojn kaj esperojn. Tre certe multaj aŭskultas kaj tamen ne skribas al la stacio.

Kiam la direkto de la stacio devos decidi, ĉu daŭrigi la Esperanto-programojn aŭ ne, la decido sendube ĉefe dependos de la nombro da leteroj ricevitaj de la geaŭskultantoj.

Tial estas tre necese, ke ĉiuj gesamideanoj, kiuj regule aŭ nur kelkfoje aŭskultas la Esperanto-programon de ĉi tiu (aŭ alia!) stacio, sendu leteron al la stacio. Per bonavola kritiko, sugestoj kaj deziresprimoj oni eĉ povas influu la enhavon de la programo. Konsciu, ke ĉiutaga duonhora programo estas tre grava por la aktualeco de la informoj kaj temoj.

La "naskiĝurbo de Esperanto" konstante dissendu Esperanto-programojn, ankaŭ post la Zamenhof-jaro!
Sukceson!
S. S. de Jong

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1959

Stato je la 31-an de majo

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Belujo	1480	1821	123.04
2.	Finnlando	1935	2340	120.93
3.	Hispanujo	1999	2265	113.30
4.	Britujo	6093	6102	100.14
5.	Svedujo	6420	6390	99.53
6.	Svislando	1950	1940	99.49
7.	Nederlando	5119	4948	96.66
8.	Francujo	7066	6334	89.64
9.	Usono	2816	2510	89.13
10.	Pollando	6635	5455	82.22
11.	Danlando	2639	2100	79.58
12.	Italujo	3980	3145	79.02
13.	Germanujo	6951	4885	70.28
14.	Norvegujo	1991	1375	69.06
15.	Jugoslavio	5690	2815	49.47
16.	Brazilo	8255	2894	35.57

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Japanujo	1150	2330	202.60
2.	Kanado	435	605	139.08
3.	Izraelo	255	230	90.20
4.	Portugalujo	615	550	89.43
5.	Islando	270	220	81.48
6.	Sudafriko	215	175	81.40
7.	Aŭstralio	1280	1001	78.20
8.	Urugvajo	325	245	75.38
9.	Novzelando	878	650	74.03
10.	Aŭstrujo	1360	825	60.66
11.	Maroko	457	226	49.45
12.	Argentino	615	270	43.90

Ĉiu larĝe pasu 100% en la Zamenhof-Jaro!

ESPERANTISTA VIVO

GEEDZIĜOJ

Svane-Birkenmayer. — Geedziĝos 3.VII.59 *Virginia Birkenmayer*, Nov-Jorko kaj *Eskil Svane*, Kopenhago. S-ro Svane estis la unua Esperanto-instruisto ĉe la U.N. kaj trovis sian edzinon inter la lernantoj tieaj. Korajn gratulojn al la junaj geedzoj.

Badstieber - Fastl. — Je Pentekosto geedziĝis en Salzburg, Aŭstrujo, f-ino *Marianne Fastl* kaj s-ro *Hans Badstieber*.

NASKIĜO

Puig. — Al geesperantistoj L. Puig Gandia, Hispanujo, (U.E.A. — F.D. kaj sekretario de la loka Esperanto-klubo) kaj Carme Cánovas naskiĝis la 27-an de aprilo filo nomata Oscar.

NEKROLOGO

Kreutzberg. — La 10.5.59 forpasis 65-jara Franz Kreutzberg, industria komercisto, multjara UEA-delegito de Kolonjo, Germanujo, fervora esperantisto-propagandisto dum 48 jaroj, fondinto de loka grupo, kies konstanta prezidanto kaj kursestro li estis dum pli ol 25 jaroj. Foriris homo kapabla, modesta, sincera!

Terrassa. — La 19-an de aprilo en Palma de Mallorca (Balearaj Insuloj) Hispanujo, mortis samideano Nicassi Terrassa, fervora esperantisto kaj multajn jarojn Delegito kaj Vic-Delegito de U.E.A. en sia urbo.

Onnen. — La 20-an de majo mortis s-ino Marie Onnen-Onnen. Ŝi estas bone konata kiel vidvino de ing. M. F. Onnen, antaŭa ĉefdelegito de U.E.A. en Nederlando. Ŝia traduko de "Kristo interne de vi" eldoniĝis antaŭ kelkaj jaroj.

Martins. — Mortis d-ro Amilcar Barca Martins da Cruz, F.D. de U.E.A. en Benguela. D-ro Martins da Cruz estis eminenta advokato kaj fervora esperantisto. Pro sia bonkoreco kaj sindonemo li estis "la advokato de la malriĉuloj".

De Ketelaere. — S-ro Morris Guillaume Johan De Ketelaere, Antwerpen, mortis la 15-an de aprilo ĉijare. Li estas malnova membro patro de esperantista familio.

PERSONOJ SERĈATAJ

Germana soldato mortis en 1916 en hospitalo pro gravaj vundoj. La flegistino, al kiu li direktis siajn lastajn vortojn, nun serĉas homojn, kiuj konis aŭ estas parencoj de

Bernhard Letko, Lyck - Kaiser Wilh. Strasse 119, BRS. Batl. IR. 147.1 REKR.DEP. 22.

Eventualajn sciigojn bv sendi al s-ro Robert Llorens, Route de Château-neuf, Montélimar (Drôme), Francujo.

Tra la Mondo

• **Francojo.** "Franca Federacio pri Kampadismo" (F.F.C.C.) eldonis mapon de kampejoj rekomenditaj de F.F.C.C. en Francojo (entute 354). La mapo estas absolute bezonata se oni deziras kampadi en Francojo. Skribu al: I.C.I.E.K., 12, Avenue Alsace-Lorraine à Chartres, (Eure et Loire) Francojo, por pliaj informoj.

• **Francojo.** Ĉi-jare la kongreso de SAT-Amikaro-propagandasocio de Esperanto inter laboristoj de franclingvaj teritorioj okazis dum Pasko 1959 en Bruselo. Kvankam temis nur pri franca kongreso ĉeestis multaj eksterlandanoj.

• **Germanujo.** "Saarbrucken industri-kaj limurbo inter verdaĵo" estas la titolo de bela varbfolio pri Sarlando. Ĝi enhavas tre belajn fotojn de Saarbrucken kaj ĉirkaŭaĵo, kaj donas impreson de vidinda kaj interesa lando. La varbfolio estas senpage havigebla ĉe: Jakob Schenkel, Neu-Aschbach, Post Klarenthal/Saar, Am Ziegelhof 30, Germanujo.

• **Germanujo.** La S.A.T.-kongreso okazos ĉijare en Dortmund de la 1-7 de aŭgusto. Adreso de OKK: Franz Gerboth, Dortmund, Eisenacherstrasse 16, Germanujo.

• **Hispanujo.** Ĉijare la jenaj urboj: Moy'a, Tarrasa, Vila Franca del Panasés kaj Sabadell posedos Zamenhof-straton. Pasintjare inaŭguriĝis tiu de la urbo Manresa.

• **Hispanujo.** En Sabadell okazis filatela ekspozicio, kiun partoprenis kolektantoj el diversaj urboj. S-ro V. Hernández Llusera prezentis la tutan kolekton de Esperanto-poŝtmarkoj, kiu altiris la atenton de multnombraj vizitintoj. En la nomita ekspozicio atingis la 4-an premion s-ro Reguant per sia prezento de nuntagaj kovertoj el Ĉekoslovakio, ricevitaj rekte dank' al Esperanto.

• **Italujo.** Dum la manifestacioj de ĝemeliĝo de Esperanto-grupoj en Mirandola (Italujo) kaj Novi-Sad (Jugoslavio) kaj samtempe kunveno de italaj esperantistaj grupetoj (la 17-an de majo) la magistrataro de Mirandola volis doni nomon de Zamenhof al loka nova strato okaze de la 100-jara datreveno de lia naskiĝo.



La urbestro de Mirandola inaŭguras la straton.

• **Italujo.** Itala Turisma Klubo eldonis broŝuron instigante membriĝi al ĝi pro la multaj avantaĝoj, kiujn ĝi donas, se oni volas koni Italujon per malmulte da mono. Turnu vin al: T.C.I. Milano, Corso Italia 10, Italujo.

• **Italujo.** La Milana Esperanto-Klubo preparas eldonon de Internacia Adresaro de Firmaoj, kiuj povas uzadi Esperanton en la interlandaj rilatoj. Interesatoj bonvolu peti informojn ĉe Centro por Esperanto en Komercio, Industrio kaj Turismo, Piazza Oberdan n-ro 1, Milano.

• **Nederlando.** De pluraj jaroj Mag. S. Pragano instruas Esperanton en la universitato de Amsterdam. Rezulte de tio formiĝis la "Esperanto-Rondo" de tiu universitato. Ĝia nuna sekretaria adreso estas: Koninginneweg 97, Amsterdam.

• **Svislando.** En kastelo Münchenwiler apud Murten-Morat estos aranĝata de la 9-23 aŭgusto du kulturaj semajnoj pri "Esperanto kaj Geonismo". Tiuj kursoj jam estas famkonataj kaj bone vizititaj. Ĉiujn informojn donas: "Svisa Esperanto-Instituto, Breitenrainstrasse 12, Bern, Svisujo.

HELPU! VI HELPU VIN!

Multaj esperantistoj klopodas eldoni prospektojn urbajn aŭ landajn ktp. Por ke la eldonintoj eksciu la efikon estas necese, ka la prospektoj estas multe demandataj. Tio utilas al ambaŭ flankoj, unue al la eldonintoj kaj due al la demandintoj, la lastaj tiamaniere kreskigis sian ekspozician materialon.

Germanujo: De Wuppertal venis al ni bela faldfolio, kiu rakontas pri la urbo, ĝiaj vidindaĵoj kaj pri la diversaj distroj, kiuj povas plezurigi la vizitontojn. Petu la faldfolion antaŭ ol vi veturos al Wuppertal.

Italujo: Pri COMO aperis tre belaspekta broŝuro — granda kun multaj belaj fotoj. Unu tre granda "Aerfoto" montras la tutan lagon kun la ĉirkaŭaĵo.

Nederlando: "Zwolle, la pordego al pentrinda regiono" kaj "Zwolle en unu horo" estas la titoloj de noveldonitaj belaj broŝuroj. Ili donas kaj per teksto kaj per fotoj multajn informojn pri Zwolle. Petu la broŝurojn de V.V.V., Verkeershuis, Stationsplein, Zwolle, Nederlando.

Prelegvojaĝo de f-ino Marjorie Boulton en Sudhungarujo.

La 5-an de Aprilo f-ino Boulton faris lumbildprelegon sub la titolo: "Pilgrimo en Esperantujo" en la urbo Szeged antaŭ 100-120 geesperantistoj. Ŝia sekvanta prelego okazis en la najbara urbo Hódmezővásárhely sub la titolo: "Lia mia moŝto". La ĉeestanta publiko en ambaŭ lokoj akceptis la prelegojn de la bonkonata poetino kun grandega aplaŭdo. Post la prelegoj f-ino Boulton kaj ŝia akompananto Julio Baghy deklamis originalajn poe-

mojn, kiujn la publiko honoris per varmaj kaj tondraj aplaŭdoj. La sekvanta sudhungarlanda urbo, kiun niaj famaj gepoetoj vizitis, estis Orosháza.

JUGOSLAVIO



La supra bildo montras la prezidanton de la Studenta Esperanto-Klubo en Kopenhago (Danlando), f-inon Birthe Traerup, kaj la estron de la folkloro sekcio de la muzikscienca instituto en Regensburgo (Germanujo), d-ron Felix Hoerburger. Ni publikigas la foton, ĉar ili konsistigas la esperantistan duonon de kvarpersona ekspedicio, kiu en ĉi tiu monato iros al Jugoslavio kaj Grekujo por dum kvar monatoj studi popolan muzikon kaj popoldancojn. Dum f-ino Traerup (kiu ĵus per la lasta ekzameno finis siajn universitatajn studojn pri muziko kaj serbo-kroata lingvo) estas esperantistino jam de la gimnaziaj jaroj, d-ro Hoerburger eklernis Esperanton antaŭ malpli ol du jaroj, sed malgraŭ tio jam en aprilo ĉijare debutis en Kopenhago kiel elokventa preleganto en la Internacia Lingvo.

LA POŝTMARKKOLEKTADO

Antaŭa sumo: 1003 steloj. Stato je la 1-a de junio: 1455 steloj. La alfluo de poŝtmarkoj estas kreskanta, kaj ni kore dankas al ĉiuj kontribuantoj. Se iuj ne ricevis konfirman dankleteron bonvolu reklami.

Esperantistino el orienteŭropa lando skribis al ni: "Mi ne povas priskribi kun kiu ĝojo mi tralegis la artikolon pri krommono en la kason de UEA. Mi ĉiam suferis pro tio, ke mi ne havas eblojn finance helpi nian movadon, sed nur profiti de ĝi per la tutmonda kulturo. Mi ĝojas, se mi per sendado de miaj poŝtmarkoj povas iomete plibonigi la ekonomion de U.E.A."

Sendu daŭre vian kontribuadon al
P. Zacho, Randbølvej 4,
Kopenhago F. Danlando.

REGULARO
pri la
ORATORA KONKURSO POR LA
JUNULARO

Art. 1

La celo de la Oratora Konkursko de U.E.A. estas evoluigi la Esperantlingvan parolarton inter la junularo. Ĝi okazas kutime dum la U.K. de Esperanto, sed ĝi povas okazi ankaŭ aliloke laŭ la decido de la Estraro.

Art. 2

Rajtas partopreni ĉiuj gejunuloj ĝis 28-jaraĝaj, kiuj aliĝis al la koncerna U.K. kaj partoprenas ĝin. La partopreno en la konkursko estas senpaga, sed ĉiu kandidato devas sin skribi anonci al la LKK aŭ al la prezidanto de la Komisiono minimume unu tagon antaŭ la tago de la konkursko.

Art. 3

La Estraro de U.E.A. decidas pri la temo de la konkursko kaj anoncas ĝin minimume unu monaton antaŭ la konkursko en la oficiala organo de U.E.A. La Estraro nomas la konkursan Komisionon, kiu konsistas el prezidanto, du membroj kaj du anstataŭantoj. La Estraro ankaŭ decidas pri la eventualaj premioj.

Art. 4

La Konkursko okazas publike, sub prezido de la prezidanto de la Komisiono kaj en la ĉeesto de la du membroj aŭ, se ili estas malhelpitaj, de iliaj anstataŭantoj.

La Oratora Konkursko okazas en la Internacia Lingvo. La kandidatoj devas paroli pri la temo libere, sen anticipi skribita teksto, sed ili povas uzi memorigajn notojn. Ĉiu kandidato rajtas paroli dum proksimume 10 minutoj, sed la Komisiono povas, depende de la nombro de kandidatoj, longigi aŭ mallongigi tiun limtempon. La prezidanto de la Komisiono anoncas, antaŭ la komenciĝo de la konkursko, la decidon de la Komisiono rilate la daŭron de ĉiu parolado.

La Komisiono juĝas la paroladojn el vidpunktoj enhava, lingva, stila kaj laŭ la ĝenerala sinteno de la kandidato kiel oratoro. La Komisiono decidas pri la unua, dua kaj tria gajnintoj tuj post la Konkursko. La nomoj de la unuaj tri premiitoj estos proklamitaj dum unu el la kongresaj kunsidoj kaj publikigitaj en la oficiala organo de U.E.A.

Art. 5

La gajnintoj ricevas diplomon kaj premiojn laŭ la decido de la Estraro (art. 3).

Art. 6

La Estraro de U.E.A. povas decidi, ke similaj konkursoj okazu ankaŭ aliloke laŭ la principoj entenitaj en tiu ĉi Regularo.

La landaj asocioj kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj povus okazigi similajn konkursojn dum siaj landaj kongresoj aŭ aliaj renkontiĝoj kaj ebligi al la gajnintoj la partoprenon en la Konkursko de U.E.A.

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

		Mallongigoj : I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.
Ciutage	9.00-9.30	Rio de Janeiro, 30.78m, 25.48m. K.I., L.B.V., Av. Rio Branco 43-3°-Rio de Janeiro (D.F.) Brazilo.
	15.30-16.00	Warszawa, 249m. (1205 kcs), 50.21m, 42.11m, 41.12m, 31.50m, 31.45m, 30.98m, 25.39m. P. Pola Radio, Koszydowa 8, Warszawa, Pollando.
Dimanĉo	14.00-14.15	Piraĉununga, 198m. (1520 kcs). K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraĉununga (Sao Paulo), Brazilo.
	19.00-19.25	Sofia, 41.35m, 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	22.30-22.55	Sofia, 49.42m, 39.11m. P.
	23.35-23.55	Bilbao, 265m. (1133 kcs). P. Radio Bilbao, Hispanujo. (Horo variebla dum unuhora diverslingva programo).
Lundo	00.45-01.00	Juiz de Fora, 60.91m. I.P. Rádio Industrial, Rua Batista de Oliveira, 745, Juiz de Fora (Minas Gerais), Brazilo.
	17.30-17.35	Bern, 48.66m, 31.46m, 13.94m. P. (D-ro Baur.) SRG., Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern, Svislando.
	18.10-18.30	Valencia, 233m. (1285 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
	19.30-19.45	Vigo, 277m. (1082 kcs). K. La Voz de Vigo, Vigo, Hispanujo.
	22.40-22.57	Hilversum, 298m. (1007 kcs). P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	02.00-02.30	Caracas, 476 m. (630 kcs), 48.62 m. P. Radiodifusora Nacional, Caracas (Venezuelo).
	11.55-12.00	Bern, 48.66m, 31.46m, 13.94m, P. (D-ro Baur).
	16.40-16.50	Wien, 513m. (584 kcs), 293m., (1025 kcs), 48m., 41m., 30m., 25m., 16m., 11m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	17.55-18.10	Roma, 50.34m., 41.24m., 30.90m. P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
	19.00-19.15	Stockholm, 32.30m., 26.10m., 20.20m. P. (nur la lastan mardon de ĉiu monato). Radio I.B.R.A., Poŝtfako 821, Stockholm I, Svedujo.
Merkredo	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	19.30-19.45	Vigo - Kiel lunde.
	22.50-23.00	Hilversum, 402m. (746 kcs), I, V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum.
Ĵaŭdo	08.30-08.40	Paris. 280m. (1070 kcs), 235m. (1277 kcs). K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55-12.00	Bern. Kiel marde P. (D-ro Privat).
	23.05-23.20	Zagreb, 264m. (1135 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.30-24.00	Sao Paulo, 62.83m. I.K. Rádio Progresso, Sao Paulo, Brazilo.
Vendredo	17.30-17.35	Bern, Kiel lunde. P. (D-ro Privat).
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
Sabato	18.30-19.00	Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 25.10m. K.I. Radio Ministério da Educação, Praça da República 141A, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	21.00-21.20	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs). K. Radio Roquete Pinto PRD5, Rio de Janeiro, Brazilo.
	22.15-22.22	Hilversum, 298m. (1007 kcs). P. K.R.O., Emmastraat 52, Nederlando.

Radio Warszawa. Ne forgesu aŭskulti la novan ĉiutagan programon kaj sendi viajn raportojn, sugestojn, kritikojn al la stacio. Ĉiun sabaton, voĉo de la 44-a Universala Kongreso.

Radio Zagreb. 2-VII, Pri la jugoslaviaj teatroj; 9-VII, Ferioj en palmoombro kaj sur bruaj ondoj; 16-VII, Radio-humoraĵo; 23-VII, Pri la jugoslavia sporto; 30-VII, Primovadaĵaj novaĵoj kaj respondoj al korespondantoj.

Radio Roma. 3-VII, La vizaĝo de Jesuo en la italaj pentraĵoj; 7-VII, Tra la literaturo; 10-VII, Novaĵoj el Italujo; 14-VII, Leterkesto kaj bibliografio; 17-VII, Pri la itala origino de la violono; 21-VII, Italaj kanzonoj en Esperanto; 24-VII, Italujo kaj Cervantes; 28-VII, Italujo kaj la turismo; 31-VII, La tria jarcento de la itala literaturo (15-a jarcento). Krome, ĉiun merkredon: Kuriero de Esperanto.

Temo de la Oratora Konkursko en Varsovio:
„La Personeco de D-ro L. L. Zamenhof“

Novaj Libroj

Duope ricevetajn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO* de K. Kalocsay kaj G. Waringhien. Tria kompletigita eldono. 1-a kajero. Eldonis Esperanto-Propaganda Centro, Milano, 1958. 181 p. 14,8 × 22,5 cm. Prezo: 4.200 it. libroj = 2,25 us. dol. 8,40 gld., 34 steloj.

Pli ol 20 jaroj pasis post la apero de la dua eldono de la sola granda kaj detala verko pri la gramatiko de nia lingvo, kaj dum preskaŭ la sama nombro da jaroj la neaĉetebleco de la libro estis ĉiam pli kaj pli severe sentata. Nun en la Zamenhof-Jaro la tiel longe sopirata tria eldono finfine aperis aŭ, pli ĝuste, komencis aperi. Oni havis la malfeliĉan ideon eldoni ĝin en tri kajeroj, kaj ĝis nun nur la unua estas eldonita. Verŝajne financaj problemoj necesigis tion.

La unua kajero enhavas jenajn 3 ĉapitrojn (post antaŭparoloj kaj la 16-regula Fundamenta Gramatiko): Ortografio kaj interpunkcio, Fonetiko, Morfologio kaj sinetio.

Ĉar mankas ankoraŭ la 2-a kaj 3-a kajeroj, tiu ĉi recenzo povas esti nur provizora, kaj prijuĝon de la tuta verko ni devas prokrasti ĝis post apero de la lasta kajero. La ĉefa celo de la recenzo estas atentigi pri la apero kaj instigi al la legantoj havigi al si la verkon, per kiu ili povas studian lingvon por perfektigi en ĝia uzado. Per tio ne estas dirate, ke ĉio en la libro estas laŭdinda. Kiel poste montrate ĝi estas je kelkaj punktoj eĉ severe kritikinda, kaj por povi proksimiĝi al perfekteco ĝi estu en la kvara eldono reviziita. Sed ankaŭ per la malperfektaj punktoj la verko povas utili per la diskutado, kiun ili kaŭzas.

Pri du demandoj mi pro aparta intereso speciale ekzamenis la novan Plenan Gramatikon: fonetiko kaj pasivaj participoj (la t.n. ata-ita-problemo), pri la lasta temo ankaŭ pro tio, ke la aŭtoroj en la antaŭparolo al la tria aldono atentigas pri minacanta "breĉo en la lingva kontinueco kaj tradicio" pro — laŭ ilia opinio — miskompreno pri la uzado de la participoj. Ambaŭ pritraktojn mi trovas bedaŭrinde nekontentigaj kaj tute nekonformaj al la intencoj de la aŭtoroj garanti al la verko sciencan valoron (vidu la antaŭparolon). Pri tiuj kaj aliaj punktoj mi intencas aperigi en nia revuo specialajn artikolojn kaj ĉi tie rimarkas nur rilate al la participa

demando, ke impresas malagrabla, ke la aŭtoroj prezentante siajn vidpunktojn kaj kritikante tiujn de la "nord-eŭropaj geometriuloj" ne referas detale ties vidpunktojn. Per tio estus donita al la legantoj eblecon por mem juĝi.

La eldonejo petis opiniesprimejojn ankaŭ pri la aspekto. Tial mi ne povas ne plendeti, unue ĉar oni ne atentis la fibrodirekton de la — cetere ne malplaĉa — papero, sur kiu estas presita la libro, kun la sekvo, ke la folioj malagrabla ondas, kaj due ĉar (eble ankaŭ pro ekonomiaj kaŭzoj) la rimarkojn oni presis per literoj de la sama granda kaj kun la sama linia interspaco kiel la ĉefteksto, tiel ke oni devis signi la finon ĉe ĉiu aparta rimarko per malbela nigra makulo.

H. V. Rasmussen

SCIENCA KAJ TEKNIKA TERMINARO* de Haferkorn-Dellian. Formato 13 × 18,5 cm, tole bindita, 250 paĝoj, eldonis Japana Esperanto-Instituto, Tokio 1956 prezo 3 us. dolaroj.

Post multjara laboro de la du germanaj aŭtoroj kaj de pluraj alilandaj kunlaborantoj el ISAE la manuskripto por la supra terminaro estis prespreta 1954, sed jam oni timis ke ĉio estis vana, ĉar la preskostoj nenie estis disponeblaj. Tiam la Japana Esperanto-Instituto dankinde disponigis la necesan kapitalon kaj kun helpo de du universitataj Esp.-kluboj ĉe la korektado la eldono realiĝis fine de la jaro 1956.

La ekstera vesto de la verko estas inde adaptita al ĝia valora enhavo: bonkvalita blanka papero, klara presko kun kvar litertipoj krom multaj grekaj literoj, matematikaj signoj kaj potencociferetoj kaj la forta tola bindaĵo donas entute plaĉan aspekton. La terminaro mem ne arogas esti kompleta. Ĝi enhavas tre multajn (ĉ. 5000) — necesajn kaj nenecesajn — terminojn el 83 sciencaj fakoj. La mallongigoj post ĉiu serĉvorto indikas la fakon kaj la fonton, el kiu de la uzitaj 53 vortaroj aŭ terminaroj la radiko estas ĉerpita, krome nlg signifas neologismo, nrk = nerekomendinda (erare kelkfoje nks = nekonsilinde). STT, la scienca kaj teknika terminaro, volas teknike kaj science kompletigi la Plenan Vortaron, tial la arango estas en sama maniero tutesperantlingva, sed en multaj kazoj oni aldonis, klarige, tradukojn en

lingvoj angla, franca, germana, latina aŭ alia. Tamen al nefakulo multaj terminoj restas trofakaj, enigmaj langorompiloj. Generale oni povas esti kontenta pri la difinoj, nur unu procenton mi volas ĉi-sekve rigardi iom kritike. Mi uzos la mallongigojn PV por Plena Vortaro, PVS por la Suplemento al PV, BT por la esperanto-germana vortaro de Butin-Sommer kaj teknika terminaro mem.

Post la termino *adheri* mi vane serĉis "adhezio". Ĉu *asbesto fleksebla* signifas ion alian ol *asbesto* (PV) ne estas klara al mi. *Balancaĵo* laŭ STT estas la oscilanta parto de horloĝo, por tio BT registris "balanciero". Envicigante *bikonkava* oni analoge ne forgesu "bikonvekso". La mensmalsano *dementia* (lat) nomigas *demento* ĉe STT, "demenso" ĉe BT kaj "demenco" ĉe PVS. *Druzo* estas mahometana sekto ĉe BT, sed en STT druzo havas 1) botanikan kaj 2) mineralogian signifon. *Dumpado* havas en STT la saman difinon kiel "dumpingo" en PV. *Ekirigilo* prefere estu anstataŭata per "startilo" (PVS). *Erzaco* estas superflua termino apud "surogato" (PV). *Feno* estas laŭ kemia nomenklaturado racia mallongigo por benzeno (C6H6) sed laŭ PV "feno" estas varma suda vento. *Fulmino* laŭ STT estas la efiko de eksplodo en eksploda maŝino, sed laŭ BT "fulmina" signifas fajrerojn spruca, flama. *Kanonika* en STT rilatas al la teoria mekaniko de Hamilton, sed en PV "kanoniko" estas honora titolo katolikisma. *Karbido* malprave estas signita nlg, PV erare forgesis tiun terminon, sed PV difinas hidrokarbidon kiel "hidrogena karbido" kaj ĝi troviĝas eĉ en la Fundamento. *Kareo* estas en STT (laŭ Zamenhof-radikaro) unurada portilo kun du manstangoj, sed en PVS *kareo* signifas "hinda spicaĵo aŭ manĝaĵo kun tiu spicaĵo". *Kermeso* estas popolfesto laŭ PV, sed laŭ STT 1) besto kaj 2) mineralo. Kial STT proponas la terminon *konjo* por la sama fungo kiu nomigas en PV *konio*? La vorto *konvertoro* devus porti la aldonon nrk = nerekomendinde, ĉar certe "konvertilo" estas pli trafa. Estas ja ilo kaj ne ero, kiu konvertas! *Koronelo* laŭ STT estas serpento (lat: coronella), sed BT registris "koronelo"-n kiel planton (lat: coronilla). Kiu pravus? La termino *kozo* = konkreta aĵo estas monstro: unuarigarde ĝi estas derivaĵo el la franca "chose" sed laŭ la indikita fonto CH = Christaller mi vane serĉis ĝin en tiu vortaro. Fine mi trovis tie "okazaĵo, kazo", ĉu eble la preserara koboldo mistifikis la aŭtoron? Anstataŭ *lakmuso* (nrk) STT rekomendas "turnesolo", sed tiu termino mankas alfabeto sub T. La multnombraj kunmetaĵoj kun *mal-* sub litero M, kaj kun *sen-* sub litero S estas grandparte superfluaj. *Martingalo* laŭ BT estas ŝnuro de busprito, laŭ STT ĝi estas vertikala stango sub la busprito aŭ fokena (?) frapilo. Kio estas *fokeno*? Laŭ

la angla traduko "dolphin striker" temas pri delfeno. *Registrado magnetofona*: ĉi tie la sonkonservanto estas difinita per "ŝtalrubando", tiu esprimo estas netrafa, la termino "sonbendo" intertempe estas internacie aplikata. Sub litero S mi vane serĉis ĝin. La difino de *remburso* laŭ la filatelia terminaro de Scott ŝajnas al mi nekompleta: remburso estas ne nur la garantismo de la poŝto pagenda por perdita poŝtaĵo rekomendita (angla reimbursement) sed ankaŭ la monsumo, kiun poŝto aŭ fervojo enkasigas ĉe la ricevanto de sendaĵo kaj poste disponigas al la sendinto (angle COD = cash on delivery). *Rodano* kiel kemia acido estas apenaŭ intermiksebla kun la franca rivero samnoma. La birdo *sirhanto* nomiĝas laŭ BT "sirapo" kaj *sorbuj* ŝajnas esti identa kun sorpo (PV). Ĉe la termino *ŝplinto* STT atentigas vidi ankaŭ "asulo", sed sub litero A ne troviĝas tiu termino. La diferenco inter *televizo* = dratdependa televido kaj "radiovidado" por la sendrata televido verŝajne ne ĝenerale disvastiĝos, kvankam teknike ĝi povas esti necesa. *Termiko* estas esprimo de "velglisado", ĉu vi jam vidis glisilon kun velo? Krome la difino por "termika" en PVS ne konformas kun termiko laŭ STT. *Totalizatoro* ĉi tie estas meteorologia instrumento, ĉe BT "totalizatoro" estas ĉevalkonkura vetakceptejo. *Translacio* laŭ la difino en STT estas nur termino matematika kaj mekanika, sed BT pli larĝence proponas ĝin ankaŭ por traduko kaj transdono de jura rajto. Certe STT eraras registrante *vakcino* (BT) = vakcinio (PV). En PV vakcino estas "injekti serumon" kaj vakcinio ĉe BT kaj ĉe PV samdifine estas arbeto sovaĝa kun ruĝaj aŭ nigraj beroj, lat: vaccinium myrtillus. Fine *vendaŭtomata nombrilo* ŝajnas al mi malbona esprimo por energinombro, kiu provizas la konsumanton je elektra (aŭ gasa) energio kontraŭ monero enĵetata.

Preseraroj estas ĝojige malabundaj kaj neniel ĝenaj. Mi trovis entute nur 11, nome: p. 17 ĉe aspidjo: *Schildfaser* anstataŭ *Schildfarn*; p. 54 ĉe eritozo: *Frröten* anstataŭ *Erröten*; p. 58 ĉe fazo: provumo anstataŭ povumo; p. 61 ĉe filtrilo malaltopasa: *filtrio* anstataŭ *filtrilo*; p. 73: *gilito* anstataŭ *gliito*; p. 114: konitaĵo anstataŭ konitaĵo; p. 135: majonto anstataŭ majanto; p. 148 ĉe nefrito: la linio "G: Niere" apartenas al la antaŭa serĉvorto; p. 181 ĉe reflekti: *RV* anstataŭ *PV*; p. 225: tentalko anstataŭ tentaklo; p. 233 lasta linio: sama anstataŭ same.

La *kemiaj elementoj* en ĉiuj terminaroj estas malkompletaj kaj ankaŭ STT tiurilate seniluziigis. Unuafoje la Germana Esperanto-Revuo kun la periode aperantaj "aldonoj al la vortaro de Butin-Sommer" kompletigas la liston de la elementoj. El la 92 naturaj kaj 6 al mi konataj artefaritaj elementoj de la Perioda Sistemo la Plena Vortaro registris nur 57, 20 pliaj trovi-

ĝas en STT, el kiuj 7 ankaŭ aperis en PVS. Tamen mankas ankoraŭ 21 elementoj, nome aktinio (Ac89), americio (Am 95), astateno (At 85), berkelio (Bk 97), franciumo (Fr 87), kaliforniumo (Cf 98), ksenono (X 54), kuriumo (Cm 96), lantano (La 57), lutecio (Lu 71 = kasiopio Cp 71), neptunio (Np 93), plutonio (Pu 94), polonio (Po 84), prazeodimo (Pr 59), prometio (Pm 61 = ilinio Il 61), protaktinio (Pa 91), renio (Re 75), samario (Sm 62), tekneĉio (Tc 43 = masurio Ma 43), terbio (Tb 65) kaj tulio (Tu 69). STT registris sur paĝo 69 elementon "joniumo", sed joniumo ne estas elemento, ĝi estas izotopo 230 de la elemento torio (Th 90). Sur paĝo 145 STT eraris, ke molibdo = molibdeno (Mo 42) estas sinonimo de tungsteno (PV), ĉar tungsteno estas identa kun volframo (W 74).

Finfine mi devas menci, ke 35 serĉvortoj en STT ne portas la fontoindikon PV, kvankam ili troviĝas en la Plena Vortaro. La plej multaj do estis tute superfluaĵoj en STT, ĉar ĝi volas esti nur komplemento al la PV. Pliaj 17 serĉvortoj estas signifaj kiel neologismoj, kvankam ili jam estas troveblaj ĉe Butin-Sommer (BT). Ĉio ĉi tamen estas nur malgravaj mankoj kompare kun la riĉa, valora enhavo, precipe telefonteknike kaj kemie. La praktika uzado neniel estas ĝenata per la cititaj mankoj kaj la aĉeto de tiu eminenta scienca konsultlibro estu sincere rekomendata al ĉiu samideano, kiu havas kontakton kun scienco aŭ tekniko. Kaj kiu el ni ne bezonas ilin ambaŭ?

AĈETU LIBROJN!

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de junio 1959

N-ro 317

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de majo kaj ankaŭ por komparo je la fino de majo 1958:

	1958	1959
Asociaj membroj	8835	6116
Individuaj membroj		
MJ	650	742
MA	4391	4860
MS	506	486
Pat.	5	7
DM	303	336
HM	46	46
JMJ	11	23
JMA	85	153
	5997	6653
	14832	12769

DELEGITOJ *

Aŭstralio
Devonport (Tasmania) D: vakas.
Sydney (N. S. Wales) D: vakas.

Aŭstrujo
Innsbruck (Tirol) FD (literatura ĵurnalismo): vakas.
Landeck (Tirol) JD: vakas.
Salzburg VD: vakas.

Brazilo
Maceió (Alagoas) VD: vakas.
Resende (Est. Rio de Janeiro) D: S-ro Sirio Silva, komercisto, Rua ABC 60.
Sentinela (MT) D: S-ro Hans Herbert Urbat, misiisto evangelia, Missão Cristã.

Britujo
Beaconsfield (Buckingham) D: vakas.
 FD (internaciaj laborkampoj): vakas.
Haydon Bridge (Northumberland) D: F-ino Elizabeth Goodfellow, ŝtata sankonsultistino, Springfield.

Danlando
Glostrup (Sjaelland) FD (fervojoj): vakas.
Risskov (Jylland) FD (filatelo): S-ro Adolph Hvorslev, pensiita komunuma instruisto, Asylvej 1.

Finnlando
Isokyrö (Vaasan lääni) D: F-ino Kerttu Kivinen, flegistino, Orismala As.

Francujo
Bugeat (Correze) D: vakas.
Montpellier (Herauld) FD (pedagogio): S-ro Leo Lentaigne, instruisto, "Esperanto", 3 Av. de la Gaillarde. FD (sindikatismo): S-ro Leo Lentaigne, instruisto, "Esperanto", 3 Av. de la Gaillarde.

Germanujo
M. Gladbach (Rheinland) FD (eklezia muziko): S-ro Jean Thouet, organisto/muzikinstruisto, Neusser Str. 346.

Worms (Rheinland-Pfalz) D : vakas.
FD (pedagogio) : vakas.

Italujo

Trapani (Sicilia) D : S-ro Nunzio Giovanni Parisi, direktoro kaj instruisto ĉe la Popola Universitato, Piazza San Pietro No. 3. Somera adreso : Discesa San Recco 10, Erice (Trapani).

Udine (Udine) D : Armando Blasoni, librotenisto, Via Cividale n. 18.

Jugoslavio

Zrenjanin (Vojvodina) FD (instruado) : S-ro Balint Kun Szabo, instruisto, Poljoprivredna Dobra "Mihajlovo", poŝtfolio 76.

Libano

Bejrut D : vakas.
FD (medicino) : vakas.

Nov-Zelando

Christchurch (Canterbury) JD : S-ro Bevan J. Clarke, kontista studento universitata, P.O. Box 274.

Pollando

Kraków-Nowa Huta D : S-ro Mieczysław Dydak, juristo, Osiedle C-33 blok 21 a m. 21.

Svedujo

Sundsvall (Modelpad) D : vakas.
Västerås (Vestmandland) D : S-ro Carl Larsson, fervojisto, Enghvällsgatan 1.

Usono

Long Beach (Cal.) D : S-ro William R. Harmon, fervojisto, 4775 Briercreech, Lakewood.

Los Angeles (Cal.) FD (fervojaj aferoj) : S-ro William R. Harmon, fervoja agento, 121 E. 8th St.
FD (filatelo) : S-ro Joseph Shkabara, estinta profesoro de geografio, 2522 Reservoir St.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ

- 415 Finnbjarnarson, S-ro Thorsteinn, Hnifsdal, Islando.
- 416 Ólafsson, S-ro Ingimundur, Reykjavik, Islando.
- 417 Campetti, Prof. D-ro Gaetano, Lucca, Italujo.
- 418 Galassi, S-ro Virgilio, Milano, Italujo.
- 419 Lacalendola, Prof. Adamo, Bari, Italujo.
- 420 Nurra, S-ro Gavino, Carbonia, Italujo.
- 421 Vaona, D-ro Attilio, Torino, Italujo.
- 422 Zacchè, S-ro Fernando, Mantova, Italujo.
- 423 Ferenc, S-ro Fodor, Novi Sad, Jugoslavio.
- 424 Moldovan, S-ro Stevan, Novi Sad, Jugoslavio.
- 425 Subotić, S-ino Nedeljka, Beograd, Jugoslavio.
- 426 Juárez, S-ro Raúl Sedeño, Camagüey, Kubo.
- 427 Rousseau, S-ro H., Tananarive, Madagaskaro.
- 428 Frutoso, S-ro, Meknes, Maroko.

FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo : 13.354.39 gld.
E. N. Mulders 10.— gld., Antiloj Nederlandaj; Buenos Aires Esp. As. 62.05 gld., Argentinaj Esp.istoj 6.50 gld., E. Sonnenfeld 13.54 gld., Argentino; M. Demol 3.72 gld., P. Samyn 2.50 gld., Belgujo; Southport Esp. Soc. 34.01 gld., G. R. Aitchison 3.77 gld., Britujo; Gudrun Rüsberg 19.15 gld., V. Kvist 5.40 gld., Ove Dybkall 16.20 gld., F. H. Solhåuge 9.18 gld., Danlando; D-ro G. Maillard 770.— gld. por speciala celo, S-ino Mounneurou 2.31 gld., Kevin Smith 7.70 gld., Martin Renner 33.20 gld., S. Flego 8.30 gld., F. Charlet 4.98 gld., S-ro Rasoanaivo 2.31 gld., R. Dubois 1.92 gld., F-ino Chavey 3.85 gld., F-ino M. Lepinte 1.92 gld., P. Cugny 3.85 gld., J. Sikora 0.77 gld., S-ino Metzger 0.77 gld., Francaj Fervojistoj 46.20 gld., Francujo; Fritz Lowitzer 4.51 gld., Helmut Rössler 9.75 gld., Germanujo; M. S. 0.72 gld., Rafael Ayala 3.60 gld., F. Vilà 1.80 gld., Hispanujo; Toth László 7.29 gld., Stefan Sztankó 7.29 gld., Hungarujo; Ermanno Filippi 1.80 gld., Prof. Adamo Lacalendola 18.— gld., Italujo; M. R. Lourenço Marques 1.60 gld., Mozambiko; H. Groendijk 2.50 gld., N.N. en V. 25.— gld., D. de Vries 5.— gld., S-ino Boersma—Vosmeyer 2.50 gld., J. Calado 2.— gld., N.N. en R. 1.20 gld., P. Rodenburg 10.— gld., "Rapido, rapido oferi por la Zamenhof-Jaro, por ke vi ne estu inter la lastaj" 45.— gld., Nederlando; J. T. Allan 10.63 gld., N.N. 53.15 gld., Nov-Zelando; Herolv Olssen 10.57 gld., Norvegujo; C. Wolczyk 3.72 gld., Pollando; Iljič Solomon Cin 2.— gld., Sovetunio; Börje Andersson 10.93 gld., Edv. Olsson 7.29 gld., Helmer Almén 7.29 gld., Svedujo; M. Fernandez Menendez 15.— gld., Urugvajo; D-ro E. James Lieberman 20.85 gld., N.N. 190.12 gld., D. E. Parrish 53.91 gld., Usono.

Entute 14.918.31 gld. je 1.6.1959.
Donacu unu milonon — aŭ pli! — de viaj jaraj enspezoj por tiu ĉi gravega celo!

ELEKTOJ KOMITATANOJ B

La limdato de tiuj elektoj estis la 31-a de majo 1959. Estis proponitaj 8 kandidatoj por 6 lokoj. La elektoj okazis laŭ la preskriboj en art. 28 de la Ĝenerala Regularo de U.E.A. (vidu p. 157 de Jarlibro 1959). La tutmonda delegitaro elektis la jenajn 6 personojn : D-ro A. Albault, Mag. W. Auld, Prof. D-ro I. Lapenna, Doc. J. Régulo Pérez, S-ro K. Söderberg, S-ro C. Stöp-Bowitz. Inter tiuj ĉi personoj Doc. Régulo Pérez estas la sola, kiu ne estis Komitatano B jam en la pasinta periodo. Pro sia gravega kultura laboro por Esperanto kiel gvidanto de la eldonejo "Stafeto", S-ro Régulo signifas grandan gajnon por la Komitato de U.E.A.

DONACO AL ĜENERALA KASO

S-ro P. J. Cameron, memore al lia edzino S-ino E. Cameron, kiu mortis la 24-an de januaro 1959 : 531.50 gld.

DONACOJ AL A.P.O.

S-ro C. Fall, Aŭstralio 1.— gld.; S-ro Rafael Ayala, Hispanujo 3.60 gld.; N.N. en V., Nederlando 5.— gld.
Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

GRAVA ATENTIGO !

Oni bonvolu ne skribi al la Centra Oficejo de 26/7 ĝis 15/8.

Oni bonvolu ne skribi al C.E.D. de 1/8 ĝis 15/9.

Leteroj senditaj inter la indikitaj tempolimoj riskas resti sen respondo. Bonvolu noti !

VARBU REKLAMOJN POR JARLIBRO 1960

Varbu dum la somero;
baldaŭ estos aŭtuno !

Bonvolu sendi la materialon al la C.O. antaŭ la 15-a de novembro 1959.

Al ĉiuj aktivuloj anticipe koran dankon !

ANONCETOJ

AVERTO ! Nek la redakcio, nek UEA iel ajn respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, aŭ pri plenumado de promesoj faritaj en ili. Tio aparte koncernas poŝtmarkkolektantojn.

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 ŝ. 6 p. por ĉiu nokto. Prezoj malaltigas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton, kaj la francan. D. Bytheway, "Flat Four", 1, Warrington Crescent, London W. 9, Britujo. Telefono CUNningham 4487.
Katolika Esperantisto ! Cu vi jam estas membro de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE)? Jar-kotizo ned. guld. 6.— = 24 steloj aŭ egalvaloro. Membroj ricevas la monatan 20-paĝan Esperanto-revuon ESPE-RO KATOLIKA. Informojn donas la Administracio de IKUE: Frederikstraat 2, Dordrecht, Nederlando.
Ibra Radio, kiu sendas el Tanger, Afriko, havas Esperantan programon la lastan mardon de ĉiu monato je 20.15 horo mezeŭropa tempo. Ond-longoj 32.5 m, 26.1 m kaj 20.2 m. Ibra sendas en multaj lingvoj. Aŭskultu kaj skribu en Esperanto al Ibra Radio, Stockholm 1, Svedujo.
Ĉu troviĝas inter la lertaj Esp-istoj anglalingvanoj kiuj scipovas la "Kristan Sciencon" kaj eble interesiĝus pri eldonado de Esp. traduko de ĝia instrulibro? Jam ekzistas unu traduko

aprobata de plej eminentaj Esp-istoj. Interesatoj bonvolu kontakti: John F. Clewe, 1234 West 40th Place, Los Angeles 37, California, U.S.A.

Esperanto-Civito, 14B Castle Avenue, Dover, Britujo. Tranokto kontraŭ unu angla pundo aŭ egalvaloro al konto de S-ro N. H. Smith ĉe U.E.A. Mendu sufiĉe antaŭe. Semajnfinoj ĝis 29-a de julio, poste ĉiutage. Atendas elŝipiĝon. Instruas anglan, francan, esperanton per rekta metodo. Mendas hotelĉambrojn por ferioj. Fondaĵo staras je 7 pundoj.

Generalan interŝanĝon de poŝmarkoj mi serĉas kun la tuta mondo. Speciala fako: ruĝa kruco kaj la medicino. Sole leteroj de fidindaj kaj persistemaj poŝmark-amikoj elpetitaj de Herbert Künzel, Dudenstr. 8, Bad Hersfeld, Okcidenta Germanujo.

Avri Salamon, Kiryat-Motzkim, POB 8, Izraelo, deziras tutmondan interŝanĝadon de poŝmarkoj, alumetskatoletikedoj, ilustr. poŝtkartoj.

Justo Chicano, Cadí 44 - 3o 2a Barcelona (12), Hispanujo, korespondu kun ĉiuj landoj pri historio de socia leĝaro de la laboro.

26-jara f-ino membrino de filmoklubo deziras korespondi kun tuta mondo pri ĉio kio estas bela. Nepre respondas. Leslawa Winnicka, Mariacka 11/13 m 2, Gdansk, Pollando.

Brazila esperantisto deziras korespondi kun tutmondaj gesamideanoj, interŝanĝi poŝtkartojn, poŝtmarkojn. Skribu tuj al: Carlos Evandro Teixeira, Delegacia Fiscal Tesouro Nacional, Belo Horizonte, Minas Gerais, Brazilo.

Pri denaska esperantisteco hejma uzado de Esperanto kaj aliaj temoj volas korespondi kun spertaj esperantistoj (eventuale ankaŭ interŝanĝi sonbendojn). José Dias Pinto, Caixa Postal 834, Santo André, São Paulo, Brazilo.

Tutmonda Esperantista Kolektanta Adresaro (dua eldono) aperis prezo 4 respondokuponoj. R. Melo, 6 pl. J. Ferry, St. Etienne, Francujo.

Venezuela Esperanto Asocio alvokas: Esperanto kurso komenciĝis en nia urbo. Partoprenas 35 gelernantoj. Sendu amase gratulpoŝtkartojn. Ni certe respondos. Adreso: Curso de Esperanto, Colegio Santa Maria, Santa Rosalia a Velazquez, Caracas, Venezuela.

Wanganui Esperanto Klubo pro Zamenhofa Jaro starigos grandan ekspozicion frue en oktobro. Bildkartoj, broŝuroj, ĉiaj esperantaĵoj petataj. Dankrespondo garantiata. Adreso: 90 Glasgow Street, Wanganui, Novzelando.

Centro por ludiloj ĉe la societ-unuiĝo "Naŝa djeca" el Zagreb, Jugoslavio deziras sian muzean kolekton riĉigi per ekzempleroj de ludiloj de diversaj

popoloj. La ludiloj povas esti folkloraj el diversa materialo, sed ankaŭ ekzempleroj de originala industria kaj meĥanika produktado. Kompense por la senditaj ludiloj la Centro proponas folklor-ludilojn el Kroatujo faritaj el ligno. Tiuj estas laŭ la formo simplaj, bunte kolorigitaj, konvenaj por infanoj en aĝo de 4-7 jaroj. Personoj, kiuj havas intereson por la interŝanĝo, bonvolu rekte sendi la ludilojn al la adreso: Centar za igraĉke, Demetrova 11, Zagreb, Jugoslavio. Tuj post la ricevo de ludiloj la Centro rekompence sendos la jugoslavajn ludilojn, nur ĝi petas la sendontojn precize indiki sian adreson.

Tutmonda Gazetara Ekspozicio (De la 15-a ĝis la 30-a de Septembro de la 1959-a). Arangata de "Esperantista Klubo "Nordo" de Educación y Descanso kaj patronata de la Provinca Sindikatestro, kun la teknika helpo de la ĵurnalo "La Nueva España". Sendu al ni amason da ĵurnaloj, revuoj, gazetoj, ktp. (de ĝenerala informado, porvirinaj, porinfanaj, pri sportoj, pri kino, fakaj, ktp.) en naciaj lingvoj. Ankaŭ ni deziras esperantistan gazeton. Se vi volas, ni pagos al vi la koston de la afranko kaj resendos la senditaĵojn. Ni ĉiam kvitancos per ilustrita poŝtkarto. Adreso: Esperantista Klubo "Nordo" de Educación y Descanso. — St. San Juan, 10 — Oviedo (Hispanujo).

<p style="text-align: center;">Aŭtunaj Feriaj E-Kursoj</p> <p style="text-align: center;">Vejde, Danlando</p> <p>Ilin ni invitas vin ĉeesti 18.-25.10. en La sporta Altlernejo de Vejle.</p> <p>Ĝiaj arbaroj portas tiam sian plej belan kaj plej multkoloran aŭtunan veston. Petu detalan programon ĉe</p> <p style="text-align: right;">L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.</p>	<p style="text-align: center;">Dum via vojaĝo servos al vi</p> <p style="text-align: center;">GASTRONOMIA TERMINARO</p> <p style="text-align: center;">de Erhard Urban</p> <p style="text-align: center;">en lingvoj esperanta, angla, ĉeĥa, franca. 128 p.</p> <p style="text-align: center;">Prezo: 3,25 gld, 13 steloj</p> <p style="text-align: center;">MENDU TUJ ĈE U.E.A.</p>
<p style="text-align: center;">la nica literatura revuo</p> <p style="text-align: center;">sub ĉefredaktoreco de Prof. G. Waringhien</p> <p style="text-align: center;">kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj aperas ĉiun duan monaton</p> <p style="text-align: center;">32/40 paĝa - - poŝtformato jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro</p> <p style="text-align: center;">Ricevas la abonojn:</p> <p style="text-align: center;">En Francujo: R. Fiquet, Poŝta konto 2259-96 Marseille</p> <p style="text-align: center;">Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perartoj de UEA</p> <p style="text-align: center;">PETU SENPAGAN SPECIMENON</p> <p>Redakcio: 7, Av. Léon-Gourdault Choisy-le Roi (Seine) Francujo.</p> <p style="text-align: right;">Administracio: 5. Bd. Stalingrad Nice (A-M)</p>	<p style="text-align: center;">12 FOTO-AFIŝOJ DE U.N.E.S.C.O.</p> <p style="text-align: center;">kun Esperanto-teksto</p> <p style="text-align: center;">memorige al la Deklaracio pri la Homaj Rajtoj</p> <p style="text-align: center;">Eldonis U.N.E.S.C.O.</p> <p style="text-align: center;">Sendas U.E.A. kontraŭ 4 resp. kup. aŭ 5 steloj.</p> <p style="text-align: center;">Novaj membroj! Konatiĝu kun</p> <p style="text-align: center;">BELARTO</p> <p style="text-align: center;">LITERATURO</p> <p style="text-align: center;">PENTRARTO</p> <p style="text-align: center;">MUZIKO</p> <p style="text-align: center;">LINGVISTIKO</p> <p style="text-align: center;">Prezo: 2,75 gld. (11 steloj) por membroj 3,25 gld. (13 steloj) por nemembroj</p> <p style="text-align: center;">72 p. Mendu ĝin tuj ĉe U.E.A.</p>

DISKOJ EN NIA LINGVO DE

Esperanto Filmo Germanujo

E-F-G/PHILIPS bonkvalitaj gramofondiskoj 45 rpm (longplay) n-ro 001 kaj 002, prikantitaj de la HORO DE E-F-G kaj de la VIRINA HORO DE LA ESPERANTO-SOCIETO HAMBURG.

n-ro 001 — Ĉu ni disiru sen esper-(skota) Adiaŭ je nokta hor' (germana) La patro migris en natur' (germ) Luneburga erikejo (germana) LA ESPERO (Esperanto himno)

nur 7.— GM

n-ro 002 — Tiritomba (itala) Vizitante Regensburgon (germana) Ho, Normandi (franca) Adiaŭo (havaja) Noktiĝas en erikejo (germana)

nur 7.50 GM

Legantoj, kiuj mendos ambaŭ diskojn samtempe, ricevos ilin je rabatita prezo de 13.50 GM entute.

Post alveno de la mono sur nia poŝtĉeka konto Hannover 209623, E-F-G, Rudi Biernath, Braunschweig, la diskoj senprokraste estos sendataj sen afrankkostoj por vi. Respondkuponoj aŭ steloj **nur** estos akceptataj de samideanoj el landoj, de kie ne estas eble sendi monon. (7.— GM = 18 respk., 7.50 GM = 19 rk, 13.50 GM = 34 rk).

E — F — G

Esperanto - Filmo - Germanujo, Rudi Biernath, Ackerstrasse 53, Braunschweig / Germanujo.

En la Zamenhof-Jaro aĉetu :

☆ **ORIGINALA VERKARO** de D-ro L. L. Zamenhof, kompilita de J. Dietterle
12,75 gld.; 51 steloj

☆ **LETEROJ DE ZAMENHOF, I kaj II**, kompilita de G. Waringhien
po 9.— gld.; 36 steloj

☆ **VIVO DE ZAMENHOF**, Edmond Privat,
3.25 gld.; 13 steloj

☆ **LA ESPERANTO-MOVADO**, Stöp-Bowitz kaj Isbrucker
2.— gld.; 8 steloj

☆ **BILDO** de Zamenhof, laŭ gravuraĵo de R. Rossetti, 21 × 27 cm.
0.75 gld.; 3 steloj

☆ **FOTO** de Zamenhof, poŝtkarto,
0.20 gld.; 0.80 steloj

Ĉio akirebla ĉe U.E.A.

TRI LIBROJ

necesegaj por ĉiuj esperantistoj

PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO

K. Kalocsay kaj G. Waringhien

8,40 gld.; 34 steloj

ESPERANTA ANTOLOGIO

redaktita de William Auld

bind. 16,80 gld.; 67,20 steloj

broŝ. 14,40 gld.; 57,60 steloj

RETORIKO de Ivo Lapenna

bind. 11.— gld.; 44.— steloj

broŝ. 9.— gld.; 36.— steloj

Legu paĝon 121 de tiu ĉi numero

Mendu ilin ĉe U.E.A. aŭ ĉe via Libroservo

PROFITE AL U.E.A.

VENDOTA RARAĴO

Originala Memorajo pri D-ro ZAMENHOF

Plena teksto de fabelo de Andersen :

"LA NAJTINGALO"

12 folioj, tajpitaj de D-ro ZAMENHOF sur lia malnova skribmaŝino kaj de li mankorektitaj. Suplemente: koncernaj presprovaĵoj, denove korektitaj de li, kun lia subskribo por permeso al presigo en "LA REVUO" numero de Marto 1908.

Ofertojn ne malpli ol 5 Pundoj Sterlingaj

(aŭ egalvaloro)

adresu al **Marcel DELCOURT**

U.E.A. - delegito

Parc des Francs — Voie 2 (5/6)

TOURCOING (Nord) (Francujo)

La proponinto de la plej bona sumo akiros tiun valoregan dokumenton. U.E.A. mem zorgos pri la liverado. Enpoŝtigu respondon antaŭ la 1-a de Oktobro 1959 (el aliaj kontinentoj aerpoŝte).

PROFITE AL U.E.A.

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam